KOMPUTIKA REVIZIO

por Plena Ilustrita Vortaro

de Edmund GRIMLEY EVANS (decembro 1996)

Mallongigoj:

POK = Sergio POKROVSKIJ aŭ lia "Komputika Leksikono"

SCE = la novaĵgrupo "soc.culture.esperanto"

KBT = "Komputada Baza Terminaro" (Kalckhoff; Pick; Broise)

Mi konfesas, ke mi ne sufiĉe atentis la distingon inter ▷ kaj ⇒.

Necesas legi miajn notojn (alineojn komenciĝantajn per "NOTU:"), ĉar en ili mi mencias multajn referencojn aldonindajn al artikoloj, kiujn mi mem ne revizias. Referencoj estas gravaj, ĉar alie multaj vortoj restos kvazaŭ fantomoj: se neniu alia artikolo referencas al ili, oni ne havas manieron por trovi ilin, ne jam sciante pri ilia ekzisto.

Mi menciis jenajn vinjetojn: EL = Elektro; ELE = Elektrotekniko; FILO = Filozofio; KOMP = Komputiko; MAT = Matematiko; MUZ = Muziko; SCI = Sciencoj; TEK = Teknikoj; TEL = Telekomunikoj; TIP = Tipografarto, Libroj

Ĉiuj estas el PIV, escepte de KOMP. Mi supozas, ke "Elektrotekniko" inkluzivas elektronikon, kaj ke "Teknikoj" inkluzivas inĝenierion. (Verŝajne *tekniko* estas sinonimo de *inĝenierio*.)

Ĝenerale la kapvortero de artikolo kaj la vorto *kaj* estas mallongigitaj al "~" kaj "k", respektive, kun escepto de referencoj aperantaj post "=", "▷" aŭ "⇒", sed en jenaj artikoloj oni povas trovi interesajn esceptojn: a, el, en, il, kaj, KD, ne, nek, trans.

La signoj {, }, \ kaj $ havas specialan signifon por LaTeX, per kiu mi kompostis miajn proprajn presprovaĵojn. Kie tiuj signoj aperas en (la fonto de) ĉi tiu dokumento, tie oni devos redakti. Kaj "–" signifas haltostrekon, do pli longan strekon ol nur "-". Kelkfoje mi volas apliki signon, kiun mi ne aperigis surpapere eĉ por mi mem, sed mi atentigas pri tio en la notoj. (Vidu ekzemple ĉe *dieso* kaj *grado*.)

***a.** [...] **volvita ~.** La signo @; = heliko. ▷ *Askio.*

***adiaŭ.** [...] **~i** (tr) **1** Diri ~ al iu: *li ~is ŝin kun larmoj.* **2** KOMP Indiki al komputilo la finon de seanco. ▷ *saluti.*

adici[2]i [...] **~ilo** = sumilo.

***adres/o** [...] **3** KOMP Nombro indikanta la lokon, kie dateno estas tenata en memoro: *absoluta, relativa, virtuala, fizika ~o*; *~spaco*; *~ingo* (dateningo por teni ~on). [...] **ret~o** KOMP Signoĉeno uzata en retpoŝto por indiki uzanton k komputilon.

***afabl/a** [...] **3** KOMP Facile uzebla por nesperta uzanto: *~a programo.* [...]

afiŝ[1]o. 1 [...] **2** KOMP Publika mesaĝo en komputila reto. ▷ *retnovaĵoj.* [...] **~ejo** KOMP Sekcio aŭ forumo por ~oj 2. ▷ *bultenejo.* [...]

***ag/i** [...] **inter~i** Efiki aŭ influi al si reciproke: *la ideoj inter~as*; *oni inter~as kun aliaj uzantoj.* **inter~a** KOMP Permesanta aŭ rilatanta ambaŭdirektan komunikadon kun uzanto dum funkciado: *inter~a komputila sistemo*; *inter~a televido.* ▷ *dialogo, realtempa.* [...]

NOTU: La vorto *interagi* ŝajnas esti komunlingva, sed malofta. Mi ne havas verajn ekzemplojn, sed mi pensas, ke ĝi ekzistas.

***agord/i** [...] **4** KOMP Elekti konvenajn valorojn por la parametroj, kiuj difinas la funkciadon de komputila programo: *~i novan programon*; *registri la ~aĵon.* ▷ *instali.* [...]

agraf[1]o [...] **4** TIP Supersigno en la vjetnama lingvo kun la formo de senpunkta demandosigno. [...]

akumul/i [...] **~ejo** KOMP Dateningo, kiu tenas unu el la argumentoj k la rezulton de aritmetika operacio. [...]

algebr[1]o [...] **ŝalt~o** KOMP Bulea ~o aplikata al la konstruado de ciferecaj cirkvitoj. ▷ *kombinilo.*

Algol/o 1 [...] **2** KOMP Matematikeca programlingvo aperinta en la 1960-aj jaroj.

NOTU: Eble la programlingvo *Algolo* havu apartan artikolon pro siaj aparta etimologio kaj neparenca senco.

algoritm/o KOMP Eksplicite preskribita procedo por plenumi iun kalkulon: *la ~o de Eŭklido* (por trovi la plej grandan komunan divizoron de du entjeroj); *~o por ordigi liston en tempo n log n.* ▷ *programo.*

aline[2]o 1 TIP Peco de teksto, normale konsistanta el pluraj frazoj, komenciĝanta per nova linio k distingita de aliaj ~oj per vertikala spaco, deŝovo de la unua linio, ks. ▷ *paragrafo.* **2** (ark) Deŝovo de la unua linio de ~o 1.

NOTU: Senco 2 estas la unua senco en PIV, sed apenaŭ iu uzas ĝin. La difino de *paragrafo* ŝajnas adekvata, sed eksplicita referenco (sago) al *alineo* estus utila.

analog[7]a. 3 KOMP (pp datenoj) Kontinua, glate ŝanĝebla. ▷ *cifereca.* **~a komputilo.** Komputilo, kiu funkcias per fizika simulado de problemo, ĝenerale kun kontinuaj kvantoj.

aparat[1]o [...] **~aro** KOMP La tuta fizika ekipaĵo de komputila sistemo. ▷ *aranĝaĵo, programaro.* **flank~o, periferia ~o** KOMP ~o konektita al komputilo, ĝenerale por enigado aŭ eligado, aŭ kiel ekstera memorilo. ▷ *organo.*

NOTU: Senco 5 en PIV de *aparato* ŝajnas kombinebla kun senco 1.

NOTU: Estu referencoj inter *ekipaĵo* kaj *aranĝaĵo*, kaj de tiuj vortoj al *aparataro.*

apostrof[2]o 1 Skriba k tipografia signo ('), montranta la forigon de vokalo: [...] **mal~o.** Askia signo kun la formo de inversa ~o aŭ de maldekstra korno, iafoje uzata kiel malferma citilo.

NOTU: Verŝajne estas pli bone ne presi ekzemplon de la malapostrofo, ĉar la sama askia signo (kodero 96) aspektas diverse, depende de la tiparo.

aprior/a [...] **3** KOMP (pp objekto en komputila programo) Disponebla en ĉiu programo sen eksplicita deklaro aŭ difino: *~a proceduro, funkcio, konstanto.* ▷ *implicita, praproceduro.* [...]

***arangˆ/i** [...] **daten∼o** KOMP Maniero, en kiu datenoj estas ∼itaj en memoro aŭ sur datenportilo. ▷ *prepari 5.* [...] **tekst∼o** TIP Maniero, en kiu teksto estas ∼ita sur paĝo. ▷ *komposti, enpaĝigi.* [...]

NOTU: Kaj sendu al *tekstaranĝo* de *komposti* kaj *enpaĝigi.*

aritmetik¹o. [...] **∼ilo** KOMP Parto de komputilo, kiu plenumas ∼ajn operaciojn. ▷ *regilo, organo, procesoro.*

***ark/o** [...] **7** MUZ Kurba linio super aŭ sub skribitaj muzikaj notoj, indikanta, ke la notoj sonu glate, aŭ ke ili sonu kiel unu longa noto. **8** TIP Supersigno kun la formo de ∼o (o͡, o͡o). ▷ *cirkumflekso, ligaĵo, diftongo.* [...]

NOTU: BENSON (1995) proponas la nomon *ligaturo* por la muzika signo. Muzikistoj decidu.

NOTU: Se ne eblus komposti la supersignon *arko*, indus pli bone priskribi ĝian aspekton. Pri ĝia uzado mi ne multe scias. Ŝajne ĝi aperas super unuopa vokalo en la greka.

arkiv³o [...] **3** KOMP Kolekto de malofte uzataj datenoj: *bend∼o*; *densigita ∼o*; *en∼igi dosieron*; *∼igi malnovajn redakciojn.* ▷ *savkopio.* [...]

asembl/i KOMP Traduki programon el ∼a lingvo al maŝinlingvo. **∼ilo.** Tradukilo por ∼a lingvo. **∼a lingvo.** Formala lingvo, tradukata per ∼ilo, en kiu oni specifas individuajn maŝinlingvajn instrukciojn per mnemonikaj nomoj k simbolaj adresoj; = simbola maŝinlingvo.

[asembler/o] [Forigu.]

***asign/i** (tr). **1** Disponigi (rimedojn) por aparta celo: *[...]*; *∼i teron al konstruado*; *KOMP ∼i memoron por datenoj*; *KOMP mal∼i memoron.* ▷ *atribui, ĝiri.* [...]

NOTU: La unua difino en PIV estas "Difini k disponigi sumon da mono por aparta celo". Laŭ mi la objekto ne devas esti mono, sed povas esti ajnaj rimedoj. Mi trovis ekzemple jenan frazon en Monato: "El tiuj 125 akreoj, 50 estos asignitaj al apartamentaroj". Mi forigas la vorton *difini*, ĉar ĝi ne ŝajnas utila. Kaj mi proponas du novajn ekzemplojn.

Aski/o KOMP Ofte uzata 7-bita signaro (ASCII): *∼a dieso*; *∼a dosiero.* ▷ *Unikodo.*

asterisk/o TIP Signo kun la formo de steleto (*), uzata i.a. por indiki (post vorto aŭ frazo) referencon al piednoto, (ene de vorto) ellasitajn literojn, (sole) dividon en teksto, (en lingvistiko, antaŭ vorto aŭ frazo) neatestitan aŭ neakcepteblan formon; = steleto.

***ating/i** [...] **∼o** [...] **3** KOMP = aliro. [...]

atribu¹i (tr). **1** Doni (ion) laŭrajte aŭ laŭmerite: *∼i al iu la unuan premion*; *∼i privilegiojn*; *∼i domon kiel parton de heredaĵo*; (f) *∼i valoron al variablo.* ▷ *asigni, aljuĝi.* **2** Opinii, ke aĵo, ago aŭ eco apartenas al iu aŭ io: [...] **∼o, ∼ado** [...] **3** KOMP En komputila programo, instrukcio, kiu donas valoron al variablo. ▷ *ŝargi.*

NOTU: La unua difino en PIV estas "Asigni, doni ion al iu kiel lian". Mi proponas aliajn vortojn por pli klare esprimi la saman ideon, kaj mi aldonas du novajn ekzemplojn, mallongiginte unu el la jamaj. (La vorto *asigni* ĝenas kiel unua vorto de la difino, ĉar ĝi apenaŭ estas sinonimo de *atribui.*) Al la dua difino mi nur aldonas la vortojn "aŭ io"; la ekzemploj ŝajnas jam bonaj.

NOTU: Senco 1 en PIV de *atribui* ŝajnas esti la malplej ofta. Oni povus konsideri reordigon de la sencoj (2-3-1), kvankam ofteco ne estas la sola kriterio.

***aŭ.** [...] **(inkluziva) AŬ-funkcio, kaj∼o** KOMP Bulea funkcio, kies rezulto estas 1, se iu el la argumentoj estas 1. ▷ *disjunkcio.* **ekskluziva AŬ-funkcio, dis∼o** KOMP Bulea funkcio, kies rezulto estas 1, se nepara nombro de la argumentoj estas 1. ▷ *NEK-funkcio.* ⇒ *kombinilo.*

aŭtomat¹o [...] **3** KOMP Abstrakta meĥanismo, kiu ŝanĝas sian staton k legas k skribas signojn laŭ iaj reguloj: *finia, nefinia, staka, turinga ∼o.* [...]

NOTU: Forigu la elektronikan kalkulaŭtomaton el senco 2.

[baĉ/o] [Ne enmetu.]

NOTU: La angla vorto *batch* respondas al *komandodosiero* aŭ al *tasko* en *taskvica komputado.*

bajt/o KOMP **1** Grupo de bitoj, kiun komputilo traktas kiel unuon, aŭ kiu prezentas unu signon: *okbita ∼o.* ▷ *bitoko, vorto, ĉelo.* **2** Unuo uzata por mezuri la grandon de memorilo aŭ de komputila dosiero, plej ofte egala al 8 bitoj, simb. B. **kilo∼o** 1000 aŭ 1024 ∼oj, simb. kB. **mega∼o** miliono da ∼oj aŭ 1024 kilo∼oj, simb. MB: *komputilo kun 8 mega∼oj* (8 MB) *da memoro.*

bank¹o [...] **daten∼o** KOMP Granda kolekto de datenoj alirebla por pluraj uzantoj. ▷ *datenbazo.* **inform∼o.** Servo, kiu kolektas, organizas k disponigas informojn. ▷ *biblioteko.*

baskul/o [...] **4** ELE Elektronika cirkvito, meĥanismo aŭ variablo ŝaltebla inter du statoj: *majuskla ∼o de tajpilo*; *∼a variablo.* ▷ *flago, reĝimklavo.*

baŭd/o TEL Mezurunuo de la rapido de elektronika datentranssendo, egala al unu signalŝanĝo sekunde, simb. Bd: *se signalo ŝanĝiĝas inter 16 valoroj, 2400 ∼oj implicas 9600 bitojn sekunde.* ▷ *modemo.*

Bazik/o KOMP Simpla programlingvo el la 1960-aj jaroj, multe uzata kun mikrokomputiloj (BASIC).

bend/o 1 [...]: *[...]*; *magneta ∼o* (por registrado de muziko aŭ komputilaj datenoj); [...] **tru∼o** TEL KOMP Paperstrio uzata kun telekso, komputilo ktp por registri informojn per vicoj da truoj. ▷ *trukarto.*

NOTU: Laszlo SZILVASI atentigis pri ebla problemo pri la vorto *bendo* en faka kunteksto: oni ne volas havi la saman vorton por magneta rubando kiel por intervalo de frekvencoj. Tiu dua senco de *bendo* ŝajnas bone establita en la faka lingvaĵo, dum la unua ŝajnas jam bone establita en la komuna lingvo, do eble en faka kunteksto oni parolu pri *magneta rubando*, eĉ se en la komuna lingvo sufiĉas *sonbendo* (kiu signifus ion alian al fakulo). Tia malkongruo inter la faka kaj komuna lingvoj certe estas ĝena. (Cetere, la PIV-a difino de *sonbendo* estas plene freneza.)

bibliotek[1]o [...] **5** KOMP Aro da proceduroj kun ĝenerala utileco disponeblaj por uzado en aliaj komputilaj programoj: *∼o de matematikaj, grafikaj proceduroj.*

bild[1]o [...] **tele∼igi** [Forigu.] **tele∼igilo** [Forigu.] [...] **∼ero** KOMP Unu el la punktoj, kun difinitaj helo k koloro, el kiuj konsistas ∼o ekz. sur komputila ekrano; = rastrumero. [...] **bit∼o** KOMP ∼o difinita per tabelo de nombroj, kiuj difinas la koloron de po unu ∼ero; = rastrumo. [...]

NOTU: Mi neniam renkontis la vortojn *telebildigi* kaj *telebildigilo.* Ŝajne temas pri (malnova speco de) telekopiado.

binar/a [...] **3** MAT (pp nombrosistemo) Dubaza, duuma. **4** KOMP Uzanta nur du valorojn aŭ simbolojn, ĝenerale 0 (nul) k 1 (unu) ▹ *bulea, duuma.* **∼e kodita dekuma kodo** KOMP Kodo por dekumaj nombroj, en kiu ĉiun dekuman ciferon prezentas kvar bitoj; mll BKD-kodo. ▹ *duume kodita dekuma kodo.*

NOTU: Mi kopiis sencon 3 (dubaza, prezentanta nombrojn kiel sumojn de potencoj de du) el la matematika revizo, sed laŭ mi *duuma* estas pli bona ol *binara* por tiu senco, do oni povus nur sendi tien. Sed en iuj lingvistikaj teorioj oni uzadas binarajn valorojn + kaj −, do *binara* ne estas sinonimo de *duuma* en ĉiuj sencoj.

***bind/i** (tr). **1** [...] **2** KOMP Fari munteblan programdosieron el sendepende tradukitaj partoj, la celdosieroj de tradukilo: *∼ilo*; *∼ŝargilo.* ▹ *ŝargi.* [...]

bit/o KOMP MAT **1** Mezuro de informo egala al la kvanto, kiu permesas elekton inter du alternativoj, k tial prezentebla per unu duuma cifero. **2** Duuma cifero (0 aŭ 1). **∼igi** KOMP Konverti al ciferecaj datenoj; = ciferecigi: *∼igi bildon, sonon.* **∼igilo** KOMP Aparato por ∼igi; = ciferecigilo: *bild∼igilo*; *son∼igilo.* ▹ *legilo, skanilo.* **∼oko** KOMP Grupo de ok ∼oj, ofte uzata kiel unuo en telekomunikado. ▹ *bajto.* **kontrol∼o** KOMP ∼o aldonita al datenoj por ebligi kontrolon pri eraroj dum transsendado aŭ konservado: *kun pluraj kontrol∼oj por ĉiu grupo de daten∼oj eblas aŭtomate korekti unuopajn erarojn.* ▹ *parecbito.*

NOTU: *Bito* havas ankaŭ ŝipkonstruadan/navigadan sencon.

NOTU: La aserto en PIVS, ke *bito* estas mallongigo de "binary digit" estas misa, unue ĉar parolantoj ne konsideras la vorton kiel mallongigon, eĉ ne en la angla, due ĉar PIV ne estas etimologia vortaro, kaj trie ĉar, eĉ se PIV estus etimologia vortaro, oni devus mencii, ke Esperanta *bito* devenas unuavice de jam ekzistanta angla vorto *bit.* (Cetere, laŭ unu aŭtoro la etimologio estas "Basic indissoluble Information uniT"!)

***blat/o** **1** [...] **2** ELE Integra cirkvito (ico) muntita en ingo k preta por muntado ekz. sur cirkvita tabulo.

NOTU: La difino en PIVS lasas la distingon inter *blato* kaj *ico* iom malklara, sed ĉi tio ŝajnas esti la intenco. Ni lasu al la uzantoj mem decidi, ĉu ili volas "ĵargone" apliki la vorton *blato* ankaŭ al ico; ne decas al PIV fantazii pri neekzistanta ĵargono.

blok[3]o [...] **7** TEK Relative memstara parto, kies aparta funkcio estas precize difinita, por ke oni povu projekti ĝin aparte k poste kunmeti en sistemon; = sistembloko: *interfaco inter ∼oj*; *anstataŭigi difektitan ∼on.* [...] **sistem∼o** = bloko 7. [...]

NOTU: La antaŭa difino estis "Aro da organoj, formanta tutaĵon, k tia, ke oni povas facile ĝin anstataŭigi per alia simila, en okazo de difekto de la aparato aŭ maŝino". Mi ne intencas vere ŝanĝi la sencon, nur la emfazon: projektado estas hodiaŭ pli grava ol riparado, mi pensas.

NOTU: En komputila programo *block* povas esti grupo de programfrazoj limigita per iuspecaj krampoj kaj uzebla en la loko de simpla programfrazo (*compound statement, kompleksa frazo, parenteza ordono*), kiu ĝenerale samtempe estas *deklarujo* (regiono, kiu limigas deklarojn), sed la detaloj dependas de la programlingvo, kaj temas pri afero tro faka por normala vortaro.

***branĉ/o** [...] **5** KOMP = dosierujo. [...]

brems[1]o **1** [...] **2** KOMP Klavo, per kiu la uzanto petas interrompon de la funkciado de komputila programo. ▹ *interrompo.* [...]

NOTU: Indus referenci de *haltigi* al *bremso* (kaj ne nur pro komputiko).

***bru/i** [...] **∼o** **4** ELE Nedezirataj ŝanĝoj de elektra tensio ks, miksitaj kun la dezirata signalo: *blanka ∼o* (∼o egale distribuita en ĉiuj frekvencoj). [...]

NOTU: Mi aldonas ĝin kiel la respondaĵon de *signalo.* Elektoteknikisto eble scias pli bone.

bufr/o[Z] [...] **3** KOMP Provizora memoro por datenoj, ekz. por pli efike uzi aparatojn, kiuj traktas datenojn kun malsamaj rapidoj. ▹ *staplo.* **[linio∼o]** [Ne enmetu.]

NOTU: La termino *liniobufro* estas memkomprenebla el siaj partoj kaj ne tre grava aŭ utila.

Bule/o. George Boole, angla matematikisto (1815-1864), kiu formaligis logikon. **∼a** KOMP MAT Uzanta nur du valorojn, kiuj respondas al vero k malvero: *∼a variablo, algebro, funkcio, operacio, esprimo.* ▹ *binara, AŬ-, KAJ-, NE-, NEK-funkcio.*

NOTU: Simile kiel ĉe *Turingo*, oni bezonas la nomon pro la adjektiva formo.

bulten[5]o. [...] **∼ejo** KOMP Komputila sistemo, al kiu uzantoj konektiĝas por legi informojn k lasi mesaĝojn. ▹ *afiŝejo.*

NOTU: La *bultenejo* de FEL estas multe menciita en Monato.

bus/o **1** [...] **2** ELE KOMP Lineаro, kiu faras komunan konekton inter pluraj partoj de elektronika sistemo, ekz. por porti elektran energion aŭ por transsendi datenojn en komputilo.

***buton/o** [...] **5** ∼forma ŝaltilo. ▹ *prembutono, tuŝbutono.* [...] **tuŝ∼o** Elektra ŝaltilo sen moveblaj partoj, kiun oni funkciigas, tuŝante ĝin per fingro.

NOTU: William AULD malaprobis la uzadon de *butono* anstataŭ *prembutono* (en LBE, 1996), sed ĉu vere oni devas "premi prembutonon" por funkciigi aparaton? HOTTA Hirohiko atentigis min pri *tuŝbutonoj.* Eble la ŝaltila senco de *butono* estu la 3-a.

***c.** [...] **5** KOMP Nomo de programlingvo aperinta en la 1970-aj jaroj, unu el la plej uzataj lingvoj por verki ilprogramojn. [...]

NOTU: Temas pri majuskla C, kompreneble.

cedil/o TIP Kromsigno, uzata i.a. sub C en la franca, portugala k kataluna lingvoj, sub C k S en la turka, k sub S k T en la rumana: *∼o en la rumana ĝenerale estas subkomo.* ⊳ *subhoko.*

***cent.** [...] **el∼o, po∼o.** Unuo en ĉiu ∼o: *53 el∼oj* (53 %) *de la loĝantoj aprobis*; *25-el∼a pago*; *60-el∼a kresko.* ⊳ *procento.* **el∼aĵo, po∼aĵo, el∼o.** Proporcio esprimita per el∼oj: *la plej alta el∼aĵo en la tri jardekoj*; *granda el∼o de la demanditoj.* **el∼osigno.** TIP La signo % uzata por indiki el∼aĵon. [...]

NOTU: Notu, ke Monato i.a. uzas spaceton antaŭ la elcentosigno ("53 %").

NOTU: La PIV-a artikolo pri *elcento* estas multe tro longa kaj preskriba, laŭ mia gusto. Mi tre dubas pri la boneco de la vorto *pocento*: temas pri stranga kunmetaĵo aŭ miskompreno pri la senco de *po*. Ĝi ne estas multe uzata, mi pensas.

***centr/o** [...] **∼igi** TIP Aranĝi (tekston) meze inter la maldekstra k dekstra randoj: *∼igi la ĉapitrotitolojn.* ⊳ *dekstrigi, rektigi.* [...]

cicer/o TIP **1** Mezurunuo de longo, uzata en tipografio, egala al 12 ∼aj punktoj (4,51 mm): *kvar∼a tiparo.* ⊳ *pigo.* **2** Tiparo, kies grado estas 12 punktoj. ⊳ *petito.*

***cifer/o 1** Signo uzata por skribi nombrojn: *kvin∼a nombro*; *eŭropaj ∼oj* (1, 2, 3 ktp), *romaj ∼oj* (I, II, V, X ktp); *arabaj, hindaj ∼oj.* [...] **∼a.** Montranta informojn per ∼oj, k ne per montrilo: *∼a horloĝo.* **∼eca** ELE Funkcianta per kvantoj, kiuj povas alpreni nur certajn difinitajn valorojn k ne estas kontinue ŝanĝeblaj; = entjereca: *∼eca komputilo, telefoncentralo.* ⊳ *analoga, diskreta.* **∼ecigi** = bitigi. **∼ecigilo** = bitigilo.

NOTU: Eŭropaj ciferoj kaj arabaj ciferoj estas malsamaj. Ekzemple, la araba *5* aspektas kiel eŭropa *0*.

NOTU: Eble indus aldoni kiel ekzemplojn la esprimojn *minusklaj ciferoj* kaj *majusklaj ciferoj*, sed nur se hazarde vi scias komposti la diferencon sen tro da klopodoj. Priskribi la diferencon per vortoj certe ne indas. (Ĉiuj majusklaj ciferoj havas la samajn alton kaj profundon kiel la majusklaj literoj. Minusklaj 1, 2 kaj 0 havas la samajn alton kaj profundon kiel minuskla *a*; minusklaj 3, 4, 5, 7 kaj 9 kiel minuskla *g*; minusklaj 6 kaj 8 kiel minuskla *d*.)

cikl²o 1 Sinsekvo de okazoj, kiuj regule ripetiĝas laŭ sama vicordo: *la festoj faru sian ∼on*^{Z}; *la kora ∼o.* **2** La daŭro de unu tia sinsekvo: *la ∼o de la lunfazoj estas 19 lunaj jaroj.* ⊳ *periodo.* [...] **program∼o** KOMP Sinsekvo de instrukcioj plurfoje trairata sinsekve dum la plenumado de komputila programo. ⊳ *iteracio.*

NOTU: La distingo inter sencoj 1 kaj 2 en PIV de *ciklo* ne estas tre bone farita. *Ciklo* povas esti aŭ la sinsekvo de okazaĵoj aŭ la tempoperiodo. Ambaŭ sencoj estas komunlingvaj, kaj aparta fizika senco ne estas bezonata, se ĝia difino estas sama. Mi dubas pri la longa klarigo pri la kora ciklo; ja la "difino" estas malpli facile komprenebla ol la esprimo mem; eble tiaj informoj estu en enciklopedio, ne en vortaro. Oni ne faras bonan vortaron gaje enĵetante scierojn el ĉiuj fakoj. Cetere, se iu leganto nepre volus ekscii pri la funkciado de la koro, tiu verŝajne ne havus la ideon rigardi en PIV sub *ciklo*.

***cim/o** [...] **4** KOMP Familiara nomo de fuŝo en komputila programo.

Ciril/o. [...]

NOTU: "Cirilaj literoj" ne signifas "literojn karakterizantajn la alfabeton uzatan de la Slavoj", do "Karakterizanta la alfabeton de la Slavoj" ne estas bona difino de *cirila*. Verŝajne indas fari serĉon pri "Karakteriz" (kun la majusklo) tra la tuta teksto de PIV por vidi, ĉu tiu fuŝo ripetiĝis aliloke.

cirkumfleks/o TIP La supersigno ˆ, uzata en Esperanto en la literoj Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ, k metata sur vokaloj en kelkaj aliaj lingvoj por indiki alian prononcon de tiuj vokaloj. ⊳ *ĉapelo, hoketo.*

NOTU: Eble sendu al *tono* pro *cirkumfleksa tono* tie menciita. Rilate la antikvan grekan lingvon eble *cirkumfleksa akcento* estus pli trafa ol *cirkumfleksa tono*, sed lingvikistojn oni konsultu pri tio.

cirkvit/o 1 EL Vojo, laŭ kiu elektra kurento povas cirkuli: *fermita, malfermita ∼o*; *paralelaj, seriaj ∼oj.* ⊳ *konekto.* **2** ELE Aro de interkonektitaj elektronikaj partoj por plenumi iun funkcion: *analoga, cifereca, logika ∼o*; *oscil∼o*; *dustabila ∼o* (baskulo); *memorhava, senmemora ∼o*; *integra ∼o*; *∼a tabulo*; *presita ∼o.* ⊳ *kombinilo.* [...]

NOTU: PIV enkondukas la unuan sencon de *cirkvito* per la cifero 1 ... sed mankas aliaj sencoj! Jen mi proponas kelkajn difinojn kun ekzemploj, kvankam mi ne estas fakulo pri elektroniko. Mi intence ellasis kelkajn ekzemplojn de PIV, kiujn mi ne komprenas. La esprimoj *dustabila cirkvito, integra cirkvito, logika cirkvito* kaj *presita cirkvito* estas en KBT (57–60). Mi mem uzis la esprimon *cirkvita tabulo* aliloke.

***cit/i** [...] **∼ilo** TIP Signo uzata duope por montri la komencon k finon de ∼aĵo: *malfermi, fermi la ∼ilojn*; *surliniaj (≫...≪ aŭ ≪...≫)*, eksterliniaj ("..." aŭ '...' aŭ ,,...") ∼iloj; dustreka rekta ∼ilo ("). ⊳ *apostrofo, haltostreko.* [...]

NOTU: Mi pensas, ke sufiĉas la kvin ekzemploj, kvankam (,,...'') estas alia tradicia speco de citado manskribe en la germana kaj rusa, ŝajne. Mi sendas al *haltostreko*, ĉar oni povas montri citaĵon ankaŭ per haltostreko; tio estas eĉ la plej kutima maniero en Esperantaj libroj.

***ĉap/o** [...] **4** KOMP Gvida aŭ indika parto aldonita ĉe la komenco de teksto, komputila dosiero ks: *∼o de retmesaĝo, de procedurdifino.* ⊳ *kapo.* [...]

NOTU: De senco 5 de *korpo* oni povas sendi al *ĉapo* kaj *kapo*.

***ĉapel/o** [...] **3** TIP = cirkumflekso. [...] **∼ita 1** [...] **2** TIP Havanta cirkumflekson 3: *E-o havas kvin ∼itajn literojn.* ⊳ *supersigno.* [...]

***ĉel/o** [...] **8** KOMP Plej malgranda adresebla parto de memorilo. ⊳ *bajto, vorto.*

NOTU: Ankaŭ *memorero* laŭ POK, sed KBT donas tute alian sencon al *memorilero* (216).

***ĉen/o** [...] **5** KOMP Datenspeco en iuj programlingvoj konsistanta el vico de signoj aŭ bitoj, kun fiksita aŭ varia longo, tenata en memoro kiel unudimensia tabelo: *signo∼o.* ▷ *listo.* [...]

[ĉip/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Sufiĉas *blato*, *ico*, *integra cirkvito* kaj *splito.* Cetere, ne estus tre konvene, se ambaŭ vortoj *ĉipa* (malmultekosta) kaj *ĉipo* (blato) estus ofte uzataj.

***dat/o.** [...] **[∼umo]** [Ne enmetu.]

NOTU: Vidu ĉe *datumo.*

[data/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Ĝi ne estas uzata, kaj ĝi ne estas uzinda. (Ĝi estus precipe malkonvena en kunmetaĵoj.)

daten/o KOMP Komputile traktebla informo: *enigi, eligi, teni, transsendi, legi, skribi, registri ∼ojn*; *ciferecaj ∼oj.* ▷ *datumo.* **∼aro.** Organizita kolekto de ∼oj. ▷ *dosiero.* **∼ingo.** Parto de komputila ĉeforgano, pli rapide alirebla ol la ĉefmemoro, kiu tenas ∼on, dum ĝi estas prilaborata. ▷ *akumulejo, memorilo.* **[∼banko]** [Ne enmetu.] **∼bazo.** ∼aro organizita, por ke la ∼oj estu facile k rapide troveblaj, k eble ŝanĝeblaj. ▷ *datenbanko.* **∼opo. 1** Grupo de ∼oj, ofte diversspecaj, konservata kiel tuto. ▷ *kampo, konigilo.* **2** ∼speco en kelkaj programlingvoj konsistanta el difinita aro da nomitaj kampoj. **∼portilo** Objekto uzata por konservi ∼ojn ekster komputilo. ▷ *disko, trukarto.* **∼programo.** Programo por uzi k mastrumi ∼bazojn. **∼speco.** Speco de ∼o en komputila programo: *konkreta ∼speco* (difinita per la interna prezento k prilaborado); *abstrakta ∼speco* (difinita kiel aro de valoroj kun operacioj). ▷ *ĉeno.* **∼strukturo.** Maniero aranĝi kolekton da ∼oj en komputila memoro. ▷ *tabelo, listo.* **[∼a registraĵo]** [Ne enmetu.]

NOTU: Mi metis difinon pri *datenbanko* ĉe *banko.*

NOTU: Laŭ la matematikistoj *dateno* estas "komputile traktebla donitaĵo". Laŭ mi *donitaĵo* estas io alia: ekzemple, la rezultoj de komputado estas datenoj, sed ne plu donitaĵoj.

NOTU: La vorto *dateningo* fontas el mia propra fantazio; aliaj proponoj estas *registro* (PIV kaj KBT) kaj *reĝistro* (POK).

NOTU: Anstataŭ *datenopo* estas proponitaj *rikordo*, *datenkuno*, *enskribo* (KBT, 103). La vortoj *datenopo* kaj *rikordo* estas efektive uzitaj.

NOTU: Post hezitado mi decidis ne mencii: *datena kontrolado* (KBT, 80), *datenkorektado*; *datena gardo* (KBT, 77), *datena sekurigo* (KBT, 83), *datenprotekto*; *datenprilabora sistemo.*

datum/o 1 SCI = donitaĵo. **2** KOMP = dateno.

NOTU: Laŭ mi oni ne povas pretendi, kiel PIVS, ke *datumo* en ĉi tiu senco estas derivaĵo de *dato.* (Se oni volus derivi tiusencan vorton per la sufikso -um', verŝajne la vorto estus *donumo.*) Oni povas longe diskuti, ĉu *dateno* aŭ *datumo* estas pli bona por la komputika senco; mi, same kiel KBT, preferas *datenon.* Tamen mi konstatas, ke la vorto *datumo* estas efektive uzata de kompetentaj aŭtoroj kaj por la komputika senco (*dateno*) kaj por la scienca senco (*donitaĵo*), kaj mi ne konsideras ĝin kiel tre evitindan.

NOTU: Oni iom atakis min pro tio, ke mi faras distingon inter *dateno* kaj *datumo*, sed tiel ne estas. Mi mem uzas nur la vorton *dateno.* Mi ne scias, ĉu ekzistas homoj, kiuj uzadas ambaŭ vortojn kontraste; mi supozas, ke ne. Tamen oni devas konstati, ke la vorto *datumo* estas uzata por tiuj du apartaj sencoj, kaj ke la vorto *dateno* estas uzata por nur unu el tiuj du sencoj.

***decid/i** [...] **∼ebla** KOMP MAT Tia, ke oni povas determini per algoritmo, kiu ĉiam finiĝas, ĉu ĝi estas vera: *la haltproblemo por turinga aŭtomato estas ne∼ebla*; *∼ebla aro* (aro, por kiu ekzistas algoritmo por ∼i, ĉu io estas membro). ▷ *komputebla.* [...]

defaŭlt/o [Ne enmetu.]

NOTU: La difino en PIVS ne estas tre senchava, kaj la neologismo ne estas bezonata; vidu ĉe *implicita.*

deklar[1]i [...] **∼o 1** [...] **2** KOMP Frazo en fontlingva programo, kiu informas la tradukilon pri io, ekz. la nomo k speco de variablo, sed ne estas mem tradukata: *estu ∼o por ĉiu variablo.* ▷ *instrukcio.*

NOTU: Mi supozas, ke ne necesas aparte difini ankaŭ respondan sencon de la verbo *deklari.*

***dekstr/a** [...] **∼igi** TIP Aranĝi (tekston) tiel, ke la ∼a rando estas glata, sed ne la mal∼a: *∼igitaj subtitoloj.* ▷ *centrigi, rektigi.* [...] **mal∼igi** TIP Aranĝi (tekston) tiel, ke la mal∼a rando estas glata, sed ne la ∼a. ▷ *dekstrigi, alkadrigi.* [...]

***dens/a** [...] **∼igi 1** [...] **2** KOMP Kodi datenojn aŭ dosieron, por ke ĝi estu malpli longa: *senperde ∼igi* (tiel ke malkodado donos la originalon precize); *perde ∼igi* (tiel ke malkodado donos ion nur similan al la originalo, ĉar iaj informoj perdiĝas). **∼igilo 1** [...] **2** KOMP Komputila programo por ∼igi 2. [...]

NOTU: Ankaŭ la esprimo *kompaktigi* estas uzata, kaj POK uzas la vorton *kunpremi*, sed provizore mi elektas la esprimon *densigi.*

depon[3]i [Ne enmetu sencon 4 de PIVS.]

NOTU: Ekzistas multaj manieroj esprimi la nocion "skribi datenojn al ekstera memoro". La baza senco de *deponi* jam taŭgas por priskribi tiun agon en kelkaj kuntekstoj, tamen mi ne memoras iun ekzemplon de tia uzado. Ne necesas aldoni specialan sencon por tio.

***desegn/i** [...] **∼ilo** KOMP Komputila eligilo, kiu ∼as movante skribilon sur papero. [...]

determin[2]i [...] **ne∼isma** KOMP Rilata al komputado, en kiu je iuj punktoj estas pluraj eblaj daŭrigoj, k oni supozas apartan meĥanismon por elekti el ili: *ne∼isma algoritmo, komputado*; *elekti valoron ne∼isme*; *ne∼ismo.* ▷ *respurado.*

diakrit/a 1 Rilata al kromsignoj: *∼a signo, ∼o, ∼aĵo, ∼ilo* (kromsigno). **2** [...]

NOTU: Iuj homoj parolas pri *diakritaj signoj*, aliaj pri *diakritoj*, kaj aliaj pri *diakritaĵoj* aŭ *diakritiloj*, sed neniu vorto estas bone establita en Esperanto. Mi mem parolas pri *kromsignoj*, kaj tio plene sufiĉas por mi. Supozeble la diakrit-vortoj plaĉos al tiuj, kiuj preferas paroli nacilingve kun Esperantaj finaĵoj.

dies/o 1 MUZ Muzika kromsigno (#) metata antaŭ skribita noto por altigi ĝin je duono de tono. ▹ *bemolo, bekvadrato.* **2** KOMP Komputila signo (#) kun diversaj uzoj: *askia ∼o.* **du∼o** MUZ Muzika kromsigno (x) metata antaŭ skribita noto por altigi ĝin je unu tono.

NOTU: La muzika kaj komputila signoj ne aspektas tute same, kaj dudieso aspektas nur iomete kiel x. Se ne eblas komposti ilin ĝuste, ellasu ilin kaj eble aldonu priskribon.

NOTU: Ankaŭ la artikoloj pri *bemolo* kaj *bekvadrato* havu referencojn inter si kaj al *dieso* kaj specimenojn de la signoj, se eblas komposti ilin.

diĝit/a (evi) = cifereca.

NOTU: La vorto *diĝita* estas evitinda, ĉar ĝi donas nenian indikon pri sia signifo, ignorante la internacian etimologion – en la angla kaj en la rusa, ekzemple, la responda vorto estas derivita de samlingva vorto kun la signifo *cifero* – kaj ĉar ĝi povus miskredigi al tiuj, kiuj scias la internacian etimologion, ke *diĝito* estas la Esperanta vorto por *cifero.*

direktiv/o 1 [...] **2** KOMP Ordono aŭ indiko en fontlingva programo, direktita al la tradukilo, kiu tradukas la programon. ▹ *deklaro, instrukcio.*

disk¹o [...] **4** KOMP Ronda plato uzata por teni datenojn magnete aŭ optike legeblajn; = datendisko: *komputila ∼o; magneta, optika, fiksita, ŝanĝebla ∼o; laser∼o; prepari ∼on; registri, skribi datenojn sur ∼on.* ⇒ *dosiero.* **5** KOMP Ekstera memorilo, kiu funkcias per integra, neŝanĝebla ∼o 4: *tekokomputilo kun unugigabajta ∼o.* **∼eto** KOMP Ŝanĝebla ∼o 4, ĝenerale uzata por teni malofte uzatajn datenojn aŭ transporti datenojn; = diskedo. **∼aparato, ∼ilo** KOMP **1** Aparato aŭ organo por uzi ∼on 4. **2** = ∼o 5. **∼ingo** KOMP Fendo en ∼aparato, en kiun oni metas ∼eton. **daten∼o** KOMP = ∼o 4. [...] **kompakta ∼o.** Speco de optika ∼o, ĝenerale kun registrita muziko; mll. KD: *eldoni kompaktan ∼on de sia muziko.* ▹ *KD.* [...] **[dur∼o.]** [Ne enmetu.] **[∼o-funkciiga sistemo]** [Ne enmetu.]

NOTU: La esprimo *durdisko* estas stulta anglismo; temas pri fiksita disko, aŭ disko 5; reale ekzistas diversaj gradoj de ŝanĝebleco. La esprimo *disko-funkciiga sistemo* ŝajnas esti mistraduko de *DOS* ("diskmastruma sistemo"). Vidu la komenton ĉe *maprodo.*

NOTU: Mi ne enmetis la teknikaĵojn *virtuala disko* (parto de komputila memoro organizita por aspekti kiel disko al programo, kiu uzas ĝin, ofte uzata por efemera staplo aŭ provizoraj dosieroj) kaj *(kvazaŭ)disko* aŭ *fikcia disko* (parto de disko organizita de la mastruma sistemo, tiel ke ĝi aspektas kaj funkcias kiel aparta fizika disko kun propraj nomo, katalogo kaj logika strukturo).

disked/o = disketo.

NOTU: La formo *disketo* estas pli radikŝpara, sed la formo *diskedo* ŝajnas hodiaŭ iom pli ofta. Pro la rapida evoluo de la teknologio ne eblas antaŭvidi, kiel oni volos uzi la vortojn post 10 jaroj; ja tio, kion oni hodiaŭ nomas *diskedo* aŭ *disketo,* post kelkaj jaroj estos historiaĵo.

***dispon/i** [...] **∼aĵo.** Io ∼ata aŭ ∼ebla: *la mastruma sistemo de komputilo asignas ∼aĵojn al taskoj.*

NOTU: La vorto *disponaĵo* meritas esti pli uzata. Por POK *disponaĵo* estas speco de *risurco.*

***dokument/o** [...] **∼aro** [...] **3** KOMP Detalaj priskriboj, klarigoj k manlibroj de komputila programo. [...]

***don/i** [...] **∼itaĵo 1** SCI Observo, mezuro aŭ fakto uzata por iu kalkulo aŭ por kontroli sciencan teorion: *meteologiaj, medicinaj ∼itaĵoj; objektive registri ∼itaĵojn; akiri ∼itaĵojn per eksperimento.* ⇒ *dateno, statistiko.* [...]

NOTU: Mi sugestas, ke ĉi tiu difino, kun siaj ekzemploj, estas pli bona ol tiu proponita de la matematikistoj. Mi speciale konsilas eviti la esprimon "ĉu esplice esprimita aŭ ne", kiu logike diras nenion. Se oni forsarkas tiajn esprimojn, oni havas pli da spaco por ekzemploj, kiuj povas pli bone montri la diversecon, kiun tiuj vortoj supozeble volas emfazi.

dosier/o [...] **3** KOMP Organizita kolekto de datenoj en ekstera memoro, ĝenerale referencata per ĝiaj nomo k pozicio en ∼uja strukturo: *krei, malfermi, fermi, forviŝi ∼on; teksta ∼o; program∼o.* ▹ *datenaro.* **∼ujo** KOMP Speciala ∼o, kiu enhavas referencojn al aliaj ∼oj aŭ ∼ujoj; = branĉo: *∼uja strukturo* (aranĝo de ∼ujoj, ofte en la formo de arbo); *pra∼ujo* (∼ujo, el kiu eblas atingi ĉiun ∼on per serio de ∼ujaj referencoj). **komando∼o** KOMP ∼o kun komandoj, kiujn interpretas la mastruma sistemo. ▹ *programo.* **[aropa ∼o.]** [Ne enmetu.]

[drajv/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Sufiĉas, kaj estas pli klaraj: *diskilo, diskingo, diskturnilo, virtuala disko, fikcia disko, kvazaŭdisko.*

***du.** [...] **∼ume kodita dekuma kodo** KOMP Kodo por dekumaj nombroj, en kiu ĉiun dekuman ciferon prezentas kvarbita ∼uma nombro; mll DKD-kodo. ▹ *binare kodita dekuma kodo.*

NOTU: Ĉe POK estas *duumdekuma prezento.*

***egal/a** [...] **∼signo.** La signo =, montranta ∼econ. [...]

NOTU: Mi preferas la nomon *egalsigno,* sed la nomo *signo de egaleco* aperas jam dufoje en la artikolo, sub *egalaĵo* kaj sub *egaleco.*

ekran/o^Z [...] **5** KOMP Parto de komputilo, kiu vidigas informojn al la uzanto: *katodradia, likvakristala ∼o.* ▹ *vidigilo.*

eksces²o [...] **valor∼o** KOMP Troo aŭ maltroo.

eksponent/o 1 MAT [...] **2** KOMP En glitkoma prezento de nombro, nombro indikanta la pozicion de la komo. ▹ *mantiso.*

***el.** [...] **∼igi.** [...]: *[...]; la komputilo ∼igas la rezulton.* **∼igaĵo, ∼igo.** Io ∼igata, precipe signaloj el cirkvito aŭ datenoj el komputilo. **∼igilo, ∼iga aparato** KOMP Flankaparato por ∼igi datenojn el komputilo, kiel ekz. ekrano aŭ presilo. **[∼igatoro]** [Ne enmetu.]

NOTU: Oni povas konstrui la vorton *eligatoro* uzante la sufikson *-atoro,* kiu jam estas en PIV, sed ne indas registri kunmetaĵon, kiun preskaŭ neniu uzas.

NOTU: POK uzas la vorton *eneligo* kun la senco "Datentranssendo inter komputilo kaj ĝiaj flankaparatoj", sed la kunmeto estas iom nekutima. Verŝajne estas pli bone trakti ĝin kiel mallongigon kaj skribi *en/eligo*.

NOTU: Kompreneble *eligo* povas esti ankaŭ *eligado*; ĝi estas "resuma formo".

***en.** [...] **~igi.** [...]: *[...]*; *~igi datenojn en komputilon.* **~igaĵo, ~igo.** Io ~igata, precipe signaloj en cirkviton aŭ datenoj en komputilon; = enmeto. **~igilo, ~iga aparato** KOMP Flankaparato por ~igi datenojn en komputilon, ekz. klavaro. **[~igatoro]** [Ne enmetu.]

NOTU: Pri *enigatoro* vidu la noton pri *eligatoro* sub *el.*

NOTU: Kompreneble *enigo* povas esti ankaŭ *enigado*; ĝi estas "resuma formo".

entjer/o [...]. ▷ *reelo.* **~a, ~eca** ELE = cifereca.

epitaksi/o TEK La kresko de maldika tavolo sur la surfaco de kristalo, tiel ke la tavolo havas la saman strukturon kiel la kristala subtavolo: *~a transistoro* (transistoro, en kiu unu el la elektrodoj estas farita per ~o sur duonkonduktanta kristalo).

NOTU: Mi ne fakas pri ĉi tio; mi nur tradukas el fidindaj nacilingvaj fontoj. Tamen mi estas preskaŭ certa, ke la baza vorto estu substantivo kaj ne adjektivo kiel en PIVS.

NOTU: PIV ne havas adekvatan difinon de *duonkonduktanta*, sed la vorto estas uzata en la artikolo pri *transistoro*.

NOTU: Se mi ĝuste memoras el mia infanaĝo, *epitaksio* estas unu el la ĉefaj metodoj uzataj por fari integrajn cirkvitojn, kaj la alia estas *difuzo*.

[eprom/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Ne indas dokumenti ĉi tiun vorton. Ĝi apenaŭ estas efektive uzata en Esperanto, kaj ĝi ne estas tre grava, do pli bone estas lasi al homoj la ŝancon elpensi pli trafan esperantigon ol oficialigi ĉi tiun senspritan paŭsaĵon el la angla.

***esplor/i** [...] **operaci~o** Analizado k modelado de problemoj en industrio k ekonomio kun aplikado de matematikaj metodoj kiel matematika programado k ludo-teorio.

NOTU: Se oni havus Esperantan tradukon de *critical path analysis*, eble oni mencius ĝin ĉi tie.

fac/o [...] **inter~o** TEK Tiu parto de aparato, kiu konektiĝas kun kongrua parto de alia aparato; la loko, aŭ la preskribita maniero, en kiu du partoj de kompleksa sistemo interkonektiĝas: *inter~o por flankaparato*; *inter~o de mastruma sistemo, programo, proceduro.* ▷ *junto, fasado.* ⇒ *bloko.*

NOTU: La vorto *interfaco* estas regula derivaĵo de *faco*, kaj ĝi havas multe pli ĝeneralan signifon ol asertas PIVS, eĉ ene de komputiko.

faks/o TEL Skribaĵo aŭ desegno sendata per ~ilo; = telekopio. ▷ *faksimilo.* **~i** (tr). Sendi per ~ilo; = telekopii. **~ilo** Aparato por sendi k ricevi tekstojn aŭ bildojn per normala telefonlineo, bitigante presitan aŭ skribitan paperon ĉe la sendanto k represante ĝin ĉe la ricevanto; = telekopiilo. ▷ *telekso, retpoŝto.* **tele~o** = ~o.

NOTU: Jouko LINDSTEDT demandis pri *faks-* en DENASK-L je 1996-08-15. El la 17 respondintoj 10 preferis la uzadon, ke oni *faksas fakson per faksilo*, t.e. ke *faks-* estas kiel *leter-*, kaj 5,5 preferis, ke oni *faksas faksaĵon per faksilo*, t.e. ke *faks-* estas kiel *send-*. Nur 1,5 *faksas faksaĵon per fakso* kun *faks-* kiel *telefon-*. Do mi elektis substantivan radikon, kvankam *fakso* sufiĉe similas ankaŭ al *foto*, kiu estas verba radiko en PIV.

***fald/i** [...] **lini~o** KOMP Aŭtomata transporto al la sekva linio de la tajpata vorto, se alie ĝi transirus la randon de la teksto: *lini~a reĝimo.* ▷ *redaktilo.* [...]

***famili/o** [...] **5** TIP Kompleto de tiparoj kun diversaj fasonoj, gradoj, pezoj ktp, sed kun simila aspekto k komuna nomo: *Palatino k Kuriero estas tiparaj ~oj*; *la programo estas liverata kun ĉirkaŭ 75 tiparoj en pli ol 30 ~oj.* [...]

***fand/i** [...] **kun~i** [...]: *[...]*; *kun~i listojn, komputilajn dosierojn* (kombini plurajn ordigitajn listojn en unu ordigitan liston). [...]

NOTU: KBT havas la verbon *kunordigi* anstataŭ *kunfandi.*

fasad[1]o 1 [...] **2** KOMP La parto de komputila sistemo, kun kiu homa uzanto komunikas: *afabla ~o povas faciligi la uzadon de neafabla programo*; *grafika ~o.* ▷ *interfaco.*

***fason/o** [...] **3** TIP Grafika aspekto de presitaj signoj: *tipara ~o*; *rekta, oblikva, klasika, kursiva, graseta, roma ~o*; *ŝalti la kursivan ~on*; *kvar~a tipara familio.* **4** Formo k aspekto de artefarita objekto. **~i** (tr). **1** [...] **2** Doni al io ĝian eksteran formon aŭ aspekton: *la kovrilo estis komplete re~ita.* **tondo~o.** [...]

NOTU: Pri senco 4 de *fasono* vidu mian artikolon en *La Brita Esperantisto* (majo-junio 1996, p. 87): ĉi tiu plilarĝiĝo de la senco de *fasono* ŝajnas al mi multe pli natura ol la malsprita neologismo *dezajno*. La ekzemplo sub senco 2 de *fasoni* devenas de jena citaĵo: "la kovrilo kaj la rubrik-kapoj estis komplete refasonitaj" (Esperanto, 1996, p. 108). Alia notinda citaĵo estas: "Ĉio, kio aperas sur la ekrano, aperas ekzakte samfasone sur la papero de la printilo." (Eventoj, 0079, p. 3)

fraktur/o [...] **2** TIP Speco de gotika skribo, kiun germanaj presistoj kutime uzis antaŭ la unua mondmilito.

***fenestr/o** [...] **4** KOMP Rektangula, ofte movebla regiono sur komputila ekrano, en kiu apartaj informoj estas montrataj: *pligrandigi ~on*; *la ~osistemo X.*

***fin/i** [...] **mis~o** KOMP Ĉesigo de la plenumado de komputila programo pro eraro. ▷ *kolapso.* [...] **lini~o** KOMP Stirsigno indikanta la ~on de linio en teksta dosiero aŭ datena transsendo. ▷ *Askio.* [...] **[~-aparato, ~-modjulo]** [Ne enmetu.]

NOTU: Vidu ĉe *terminalo.*

***flag/o** [...] **3** KOMP Indikilo, kiu povas esti ŝaltita aŭ neŝaltita, por indiki kondiĉon en la plenumado de komputila programo. ▷ *baskulo.*

[firmvar/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Vidu la komenton ĉe *epromo.*

***foli/o** [...] **~umi** (tr) **1** [...] **2** KOMP Rulumi (tekston sur komputila ekrano) en paŝoj kun la sama grando kiel la ekrano aŭ fenestro. [...]

format^{1}o 1 TIP Dimensioj, alto k larĝo, de libro aŭ paperfolio: *[...]*. **2** (evi) = tekstaranĝo. **3** (evi) = datenaranĝo. **~i** (evi) = prepari 5.

NOTU: Mi ne scias, ĉu iu atentos miajn indikojn pri evitindeco, sed oni rajtas esperi. Estas interese noti, ke ĝuste la senco "prepari (diskon)" de la angla vorto plej penetras en Esperanton, kvankam tiu termino ne estas nepraĵo eĉ en la angla: oni uzas la vorton *initialise*, kiam temas pri komputilo Macintosh.

Fortran/o KOMP Programlingvo aperinta en la 1950-aj jaroj k ankoraŭ uzata, ĉefe pro siaj bibliotekoj de sciencaj proceduroj (FORTRAN).

funkci^{1}o [...] **4** KOMP En komputila programo, proceduro, kiu liveras rezulton: *liveraĵo de ~o*; *en ~ema programado oni evitas atribuadon k uzas purajn ~ojn, sen kromefikoj.*

giga/. Pref., simb. G, kun la signifo: *1 miliardo* (10^9)*: ~volto* (GV). **2** KOMP (pp la grando de komputila memorilo) 2^{30}: *~bajto* (GB). ▷ *mega/, tera/.*

NOTU: La difino de *elektronvolto* estu ĉe *volt'*, ne ĉe *giga.*

gotik^{2}a [...] **2** TIP (pp skribmaniero) Karakterizita de multangulaj literoj: *~a tiparo.* ▷ *frakturo, roma.* [...]

***grad/o 1** [...], simb.: o: *[...]*. [...] **9** TIP Vertikala grando de tiparo, ekz. la distanco inter linioj, inter kiuj oni povas skribi ĉiujn signojn de tiparo, ofte mezurata per punktoj: *tipara ~o*; *libro presita en la 12-a ~o.* ▷ *cicero, petito.* [...]

NOTU: Metu la ĝustan simbolon anstataŭ *o.* (Ĝi aperis en la artikolo pri *temperaturo.*)

grafik/o^Z 1 Arto de prezentado de objektoj per desegnaj linioj: *komputila ~o.* [...] **~a^Z.** [...]: *[...]*; *KOMP ~a ekrano.* [...]

NOTU: Nur la ekzemploj estas novaj. POK tute ne uzas la vorton *grafiko*, nek la verbon *grafiki*, sed ĉie la vorton *grafikado.* (POK uzas la finaĵon *-ado* iom maltradicie.)

***gras/o** [...] **~a** [...] **4** Donanta la impreson de io ŝmirtaŭga k denseca: *[...]*; *TIP ~a fasono, tiparo* (kun larĝaj strekoj); *[...]*. **~eta** [...] **2** TIP Kun tipara pezo meza inter ordinara k ~a tiparoj. ▷ *pezo.* [...]

***hak/i** [...] **~valoro** KOMP Valoro kalkulita el iu dateno, tiel ke ĝia distribuo estu laŭeble egala. **~funkcio** KOMP Funkcio por kalkuli ~valorojn. **~tabelo** KOMP Datenstrukturo, en kiu oni serĉas datenopon ĉe pozicio difinita per ~valoro de ĝia konigilo. [...]

NOTU: Nova senco de la verbo *haki* estas implicita, sed ne difinita. Mi lasas tion al la ĵargono.

hardvar/o (evi) = aparataro.

helik^{2}o [...] **3** = volvita A. [...]

hibrid/o^Z [...] **~a komputilo** KOMP Komputilo, en kiu estas kombinitaj k analogaj k ciferecaj partoj.

***hok/o** [...] **~eto** [...] **2** TIP Supersigno kun la formo de ~o super litero: *ronda ~eto, U-~eto* (kiel en la litero Ŭ); *pinta ~eto, V-~eto* (uzata sur konsonantoj i.a. en la ĉeĥa). ▷ *cirkumflekso.* [...] **sub~o** TIP Kromsigno kun la formo de ~o sub litero: *franca sub~o* (kun la formo de eta cifero 5 sen la horizontala streko, uzata i.a. sub la literoj C k S en la franca, portugala k turka lingvoj); *pola sub~o* (kun la formo de eta joto, uzata sub vokaloj i.a. en la pola k litova lingvoj); *latva sub~o* (kun la formo de eta komo, uzata sub konsonantoj en la latva lingvo, sed turnita super minuskla g). ▷ *cedilo, subkomo.* [...]

NOTU: Oni povus uzi apartajn neologismojn por ĉiu signo, sed tio ne donus grandan avantaĝon. Plej ofte oni scias, pri kiu lingvo oni parolas, do la distingo inter diversaj specoj de hoketo kaj subhoko ne estas bezonata. Eble la uzado de la nomo de nacio ŝajnas unuavide malneŭtrala, sed neologismo prenita el tiu nacia lingvo apenaŭ estus pli neŭtrala. Eble helpas, ke la franca kaj la pola estas inter la kvin naciaj lingvoj de la Fundamento kaj historie gravaj por Esperanto. Aliflanke oni povus preferi aliajn esprimojn: *bovlo* anstataŭ ronda hoketo, *kojno* anstataŭ pinta hoketo, *vosto* anstataŭ pola subhoko.

NOTU: Se eblas komposti la kromsignojn mem, oni prefere anstataŭigu la priskribojn per specimenoj; sed zorge kontrolu la presprovaĵojn! Jen kelkaj nacilingvaj nomoj por helpi pri la kompostado: ronda hoketo (breve); pinta hoketo (háček, caron, wedge, strešica); franca subhoko (cedille, cedilla); pola subhoko (ogonek, Polish hook, nasal hook); latva subhoko (Latvian tail, comma accent, mīkstinājuma zīme).

ic/o ELE = integra cirkvito.

NOTU: PIVS aldonas la elstare interesan, enciklopedian informon, ke oni fabrikas icon "per kontinua serio de akordigeblaj procedoj". Ni esperu, ke tiu industria sekreto ne atingos la malamikon!

ikon/o 1 [...] **2** = piktogramo 2.

iks/o. [...]

NOTU: Depende de la lingvo, la prononco de X povas esti simila almenaŭ al KS aŭ Ŝ aŭ Ĥ (kiel en la internacia fonetika alfabeto).

***-il/.** [...] montranta: **1** instrumenton: *hak~o, seg~o, manĝ~o, [...]* **2** aparaton: *paf~o, televid~o, komput~o, tajp~o, pres~o.* ▷ *-atoro.* **3** parton de aparato: *montr~o, aritmetik~o, memor~o, kombin~o.* ▷ *organo.* **4** formularon aŭ dokumenton: *aliĝ~o, abon~o, demand~o, invit~o, legitim~o, identig~o.* **5** komputilan programon: *redakt~o, interpret~o, traduk~o.* **6** ian ajn rimedon: *komunik~o, [...]* **~aĵo** KOMP = ilprogramo.

NOTU: Mi konsilas reverki la artikolon pri -il'. Estus pli klare, se oni distingus pli da sencoj; ja la nuna priskribo pri senco 1 plenigas duonon de kolumno. Indas difini apartan sencon "Formularo aŭ dokumento kun difinita funkcio", ĉar temas pri aparta kaj ofta senco. En komputiko estas multaj ekzemploj de kunmetaĵoj kun -il' en la sencoj 2, 3, 4, 5 proponitaj supre, sed certe oni povas ĉerpi ekzemplojn ankaŭ el aliaj fakoj.

NOTU: Estas interesa demando, ĉu la sufikso -il' ĉiam kvazaŭ verbigas la antaŭan elementon. Konsiderindaj vortoj estas: angulilo, buterilo, fajrilo, liniilo, manilo, ortangulilo, rektilo (PIV); aritmetikilo, diskilo, taktilo, tekstilo (uzataj en ĉi tiu reviziaĵo); kasedilo (diversloke proponita aŭ uzita).

***imit/i** [...] **∼ilo** KOMP Programo, kiu igas komputilon ∼i la konduton de alia komputilo, tiel ke eblas uzi kun la ∼anta komputilo programojn de la ∼ata komputilo. ▷ *interpretilo, simulilo.* [...]

NOTU: Laŭ KBT ĝi estas *simulatoro* (312), sed la radiko imit' pli bone priskribas la celon de la agado. Mi iom hezitis, ĉu difini la vorton *imitilo*, aŭ difini novan sencon de *imiti*, sed la implicita nova senco de *imiti* estas pli-malpli sama kiel la ekzistanta senco 1.

implic/i [...] **∼a** MAT (pp difino) Tia, ke ĝi difinas la nocion nur malrekte, per ecoj esprimitaj en la difino. (pp funkcio) Tia, ke la funkcio estas difinita nur per ekvacio, kiun devas plenumi ĝiaj valoroj. ▷ *esplica.* **∼o** MAT La logika operacio, kiu al du asertoj A k B asignas la aserton, ke B validas se A validas; tiun aserton oni skribas A ⇒ B aŭ A ⊃ B. ▷ *disjunkcio, konjunkcio, negacio.* **∼ita** KOMP Rilata al valoro supozata, se alia valoro ne estas specifita: *∼ita valoro de parametro*; *∼itaĵo*; *∼ite, la eligaĵo iras al la ekrano.* [...]

NOTU: La partoj pri *implica* kaj *implico* estas de la matematikistoj; mi ripetas ilin por komparo. (Mi mem ne estas adepto de la vorto *esplica*!)

NOTU: La vortoj *ĉemanka* kaj *pormanka* estas pripensindaj, sed ankoraŭ ne enmetindaj.

indent/i TIP = deŝovi.

indic/o. [...] **2** KOMP Nombro indikanta la pozicion de dateno en vico aŭ tabelo. [...]

NOTU: Mi donis la senconumeron 2, ĉar ĉi tiu komputika senco de *indico* estas plej parenca al la matematika senco "Simbolo akompananta k karakterizanta alian k lokita apud tiu ĉi", kiu estos senco 1, mi supozas.

indukt[3]i [...] **∼o** MAT Matematika pruvmetodo, en kiu oni pruvas asertojn A(n) unue pruvante A(1) (la ∼an komencon) k poste pruvante, ke A(n) implicas A(n+1) por ĉiu n (la ∼a paŝo); = rekurso. **∼a.** Rilata al ∼o: *∼a limeso*; *∼a difino.*

NOTU: Ĉi tio estas la difino de la matematikistoj kun du aldonoj: la egaligo al *rekurso*, kaj la ekzemplo *indukta difino.*

inform[1]i [...] **∼o 1** [...]. ▷ *donitaĵo.* **2** KOMP La signifo aŭ enhavo atribuata al komunikaĵo per la maniero, en kiu ĝi estas interpretata. ▷ *bito, dateno.* [...] **∼adiko** Scienco pri la kolektado, taksado, organizado k diskonigo de ∼oj, ofte helpe de komputiloj. ▷ *komputiko.* **∼teorio** MAT KOMP Matematika k statistika fako traktanta la mezuradon k kodadon de ∼oj 2. [...]

NOTU: En senco 1 de *informo* mi aldonis referencon al *donitaĵo.* Sencon 2 mi reverkis, kvankam mi ne estas tre sperta pri tiu fako. Laŭ mi senco 2 ne bezonas ekzemplojn, ĉar temas pri io tre teknika.

NOTU: Mi plibonigis la difinon de *informadiko* per la sufiĉe interkonformaj difinoj, kiujn mi trovis en nacilingvaj vortaroj.

***-ing/.** [...] **∼i** (tr). **1** Enmeti en ∼on: *∼i glavon, konektilon, ampolon, tubeton en korkon.* **2** KOMP Enmeti strukturon de komputila programo en samspecan strukturon: *∼ita iteracio, proceduro*; *∼adnivelo.* [...]

NOTU: Mi ne komprenas, kial PIV havas por *ingi glavon* apartan sencon de *ingi.*

[init/i] [Ne enmetu.]

NOTU: Vidu ĉe *ŝargi.*

instal[2]i (tr). **1** Starigi, meti ion en la destinitan lokon k ĝin taŭge aranĝi, por ke ĝi bone funkciu: *∼i maŝinon, novan ilaron, elektron, banĉambron*; *∼i programon* (sur la diskon de komputilo); *∼i fontanon sur placo*; *[...].* ▷ *ekipi, agordi.* **2** [...]

NOTU: Nur la ekzemplo "instali programon (sur la diskon de komputilo)" kaj la referencoj al *ekipi* kaj *agordi* estas novaj.

***instrukci/o 1** Tuto de la ordonoj k klarigoj, ordinare donitaj de superulo al subulo, pri agmaniero aŭ konduko de afero: *[...].* ▷ *direktivo.* **2** KOMP Ero de komputila programo, difinanta, kio estu farata, kiam tiu parto de la programo estas plenumata: *atribua ∼o* (= atribuo 3); *salta ∼o* (= salto 3). ▷ *deklaro, direktivo, komando, atribuo.* [...] **∼aro** KOMP La aro de ĉiuj ∼oj uzeblaj por iu komputilo: *∼aro de mikroprocesoro.* **∼nombrilo** KOMP Dateningo en komputilo, kiu tenas la adreson de la ∼o plenumota. ▷ *regilo.*

NOTU: La difino de senco 1 estis en PIV same kiel en PV. Senco 2 aperis jam en KBT; ĝi kongruas kun senco 1 rilate la eksplicitecon ("ordonoj k klarigoj"), tamen ĝi ne tiom kongruas rilate la tutecon. (Aliflanke estas facile konstati, ke la vorto estas vaste uzata plurale, malgraŭ la ekzemploj en PV kaj PIV.) KBT difinas diversajn specojn de *instrukcio* (124) kaj la terminojn *instrukciaro* (129) kaj *instrukcinombrilo* (128).

NOTU: Iuj postulas, ke *instrukcio* havu ankaŭ alian sencon: "Klarigoj kiel apliki varon aŭ uzi aparaton: zorge sekvu la instrukcion sur la skatolo."

integr/a. [...] **∼a cirkvito** ELE Cirkvito, kies eroj estas konstruitaj sur splito de duonkonduktanta kristalo, ĝenerale silicio; = ico. ▷ *blato.*

NOTU: La formo *integra cirkvito* pli konformas al la ekzistantaj sencoj de *integra* kaj *integri* ol la formo *integrita cirkvito.*

intelekt[4]o. [...] **artefarita ∼o** KOMP Komputika fako pri perkomputila rezonado k lernado.

[interfac/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Ĝi estas kunmetaĵo el *faco.*

interpret[1]i [...] **∼ilo** KOMP Programo, kiu plenumas alian programon, ∼ante ĝiajn instrukciojn laŭvice. ▷ *tradukilo.*

***invit/i** [...] **∼ilo 1** Formale presita ∼o. **2** KOMP Signo aŭ mesaĝo montrata surekrane por indiki, ke la programo atendas enigaĵon de la uzanto. [...]

NOTU: Senco 1 de *invitilo* evidente ne multe rilatas al komputiko, sed ĝi mankas en PIV, kaj mi pensas, ke ĝi ekzistas. Vidu ĉe -il'.

NOTU: POK proponis la vorton *invito* analogie al la franca kaj rusa esprimoj; Jelenc preferis *invitilo.* Aliaj ebloj estus *instigilo* kaj *petilo.*

ipsilon/o. [...]

NOTU: La prononco de Y povas esti simila al I, J aŭ rondigita I en lingvoj, kiujn mi konas. En lingvo, kiun mi apenaŭ konas, la kimra, ĝi simbolas ian mezan vokalon, mi pensas.

***ir/i** [...] **al~i 1** (ntr). [...] **2** (tr). KOMP Depreni aŭ almeti datenon ĉe memorilo ks; = atingi: *al~i diskon, memorilon*; *al~i datenbazon per komputila reto.* **al~o.** Ago de iu, io al~anta: *lasi liberan al~on al la ĝardeno*^{Z}; *la procezo okazas sub libera al~o de aero*; *havi, bari al~on*; (f) *nova al~o al edukado*; *diskal~o*; *al~tempo de memorilo*; *ajnvica, laŭvica al~o.* [...] **el~o** [...] **3** = eligo. [...]

NOTU: La termino *atingo* estas difinita de KBT (37) kaj POK, sed mi preferas la vorton *aliro.*

NOTU: PIVS donas komputikan sencon nur al *aliro*; pli bone estas doni ĝin al la verbo. La difino de *aliro* sufiĉas, por ke ĝi alprenu ĉiujn sencojn de la verbo, sed kromaj ekzemploj estas utilaj.

NOTU: La vorto *eliro* estas proponita de Bertilo WENNERGREN en lia muzika terminaro kiel malo de *enmeto.* Kvankam *eliro* havas la saman sencon kiel *eligo*, evidente la verboj *eliri* kaj *eligi* havas malsamajn transitivecojn.

iteraci/o 1 KOMP MAT Ripeto de la sama procedo en komputado: *solvi ekvacion per ~o*; *senfina ~o*; *komenckondiĉa, finkondiĉa ~o.* ▷ *rekurso, programciklo.* **2** MAT Kunligaĵo de bildigo kun ĝi mem, do $f,\ f \circ f,\ f \circ f \circ f,\ \ldots$ **~i** (tr). Ripeti (komputan procedon).

junt/o [...]

NOTU: Mi ne volas difini komputikan sencon de *junto*, sed indas aldoni referencojn al *interfaco*, *borno* kaj *klemo*, verŝajne ĉe la fino de senco 2, ĉar alie neniu povos trovi tiujn PIV-ajn vortojn.

***kadr/o** [...] **al~igi** TIP Aranĝi (tekston) tiel, ke ambaŭ randoj estas glataj. ▷ *rektigi, remburi.* [...]

***kaj.** [...] **~signo, ~-ligaĵo** TIP La signo &, origine ligaĵo el la latina vorto et, uzata kiel mallongigo de ~ en iuj naciaj lingvoj. ▷ *k.* **KAJ-funkcio** KOMP Bulea funkcio, kies rezulto estas 1, se ĉiu el la argumentoj estas 1. ▷ *konjunkcio.* **NE-KAJ-funkcio** KOMP Bulea funkcio, kies rezulto estas 1, se iu el la argumentoj estas 0. ⇒ *kombinilo.*

NOTU: En Esperanto la kutima mallongigo de *kaj* estas *k*; pro tio estas referenco al *k*.

kaligraf^Z**o.** [...] **~io**^{Z}**.** [...]: *[...]*; *~ia tiparo* (kiu imitas manskribajn signojn). ▷ *kursivo.*

***kalkan/o** [...] **liter~o** = serifo. [...]

***kalkul/i** [...] **~ilo.** Aparato por fari aritmetikajn operaciojn: *li ~is la prezon per poŝ~ilo.* ▷ *abako, komputilo, aritmetikilo.* [...] **tabel~ilo** KOMP Komputila programo por ~ado, ofte uzata por financaj ~oj, montranta al la uzanto tabelon el ĉeloj, kiuj povas enteni nombron, kies valoro ŝanĝiĝas depende de la nombroj en aliaj ĉeloj. [...]

NOTU: La vorto *tabelkalkulilo* estas sugestita de la suoma vorto kaj laŭdire respondas ankaŭ al la esprimo en la japana lingvo; POK preferas la vorton *sterntabelo* derivitan el la angla esprimo *spreadsheet.* Aliaj ebloj estas: ĉelkalkulilo, elektronika tabelo, kalkulĉelaro, kalkultabelo.

***kamp/o** [...] **7** KOMP Plenigebla parto de formularo aŭ alia dokumento traktata per komputilo. **8** KOMP Konsistanta parto de datenopo. [...]

kanal^1**o** [...] **5** TEL KOMP Vojo por elektra signalo aŭ transsendado de datenoj: *stereofonia aparato havas du ~ojn*; *plur~a telefonlineo*; *trovi neokupitan ~on*; *per signalplektado oni povas dispartigi ~on en sub~ojn.* ▷ *plekti.*

***kap/o** [...] **10** ELE Parto de disk- aŭ bend-aparato, kiu skribas aŭ legas informojn sur la disko aŭ bendo: *magnet~o*; *lego~o*; *skribo~o.* [...] **~eto 1** [...]. **2** ELE = kapo 10. [...]

NOTU: Verŝajne *kap(et)o* estas ankaŭ parto de presilo, kiu markas la paperon, sed ŝajne temas pri io pli ĝenerala: la parto de ilo, kiu tuŝas aŭ efikas tion, pri kio oni laboras. Verŝajne la kapo de martelo aŭ hakilo apartenas al tiu senco, ne al “plej alta parto de objekto”, kiel en PIV. Tamen oni ne parolas pri kapo de skribilo, do verŝajne la dikeco de ekstremaĵo aŭ simila fizika simileco al kapo estas grava.

NOTU: Sub senco 8 en PIV de *kapo* indas mencii la ekzemplon *kaplinio* (en libro, linio ĉe la supro de paĝo, super la teksto mem) kaj aldoni referencon al *piedo.* Eble ankaŭ *kapvorto* menciiĝu ie en la artikolo pri *kapo.*

karaktr/o (evi) Lingva aŭ komputila signo.

NOTU: La vorto *karaktro* ŝajne estas uzata plejparte de homoj, kiuj konfuzite ne komprenas la distingon inter *signaro* kaj *tiparo.* Apenaŭ iuj fakuloj uzas ĝin.

***kart/o** [...] **6** ELE Elektronika cirkvito sur cirkvita tabulo, ofte aparte aldonebla al kompleksa aparato; = cirkvitkarto: *~ingo* (por teni ~on k kontakti kun ĝi); *~ujo* (skatolo, en kiu ~oj estas instalitaj); *ĉef~o*; *krom~o.* ▷ *bloko.* **7** = tru~o. [...] **cirkvit~o** = karto 6. [...] **tru~o** KOMP ~o uzata por registri datenojn per truoj: *tru~otajpilo*; *tru~olegilo*; *tru~a eligilo.* ▷ *trubendo.* [...]

NOTU: Mi supozas, ke oni forigos la enkondukajn vortojn “Pli-malpli granda folio el dika papero aŭ kartono, diversacele uzata:”, ĉar ili diras nenion gravan, kio ne estas ripetata sub sencoj 1 ĝis 6, kaj ili ne aplikiĝas al la nova senco 6. (Ĉu la vortoj “pli-malpli granda” vere servas por difini la vorton?)

NOTU: Mi movis la sencon *trukarto* de *karto* al la fino, ĉar ĝi estas malgrava hodiaŭ.

kased/o. Skatoleto enhavanta bendon, diskon, filmon ks, tiel ke la tutaĵo estas metebla en aparaton k uzebla sen malfermi ĝin: *son~o*; *~o kun muziko*; *“62 minutoj” estas ~o de Persone*; *~o de lingvokurso*; *sur~a eldono por blinduloj.* ▷ *kartoĉo.*

NOTU: La formo *kasedo* ŝajnas preferata. (Eble oni volas aldoni la vorton *kasedilo*?)

kaset/o = kasedo.

NOTU: En la difino en PIV oni forgesis mencii, ke temas pri fotografio!

KD. Kompakta disko: *∼-legilo*; *komputila ∼* (KKD).

NOTU: Mi ne scias, ĉu PIV jam enhavas veran artikolon kun ekzemploj, kies kapvorto estas mallongigo; mi ne povis trovi modelon por la strukturo de ĉi tiu artikolo. La jama traktado de mallongigoj estas iom misa: ekzemple, *UEA* preskaŭ neniam estas skribata kiel *U.E.A.*, kiel en PIV. Oni devus indiki la prononcadon de mallongigoj, ĉar ne estas tute evidente, ĉu *SAT* (aŭ *S.A.T.* laŭ PIV) estas prononcata kiel [sat'] aŭ kiel [so' a' to'] aŭ kiel [soato]. Kompreneble la unua prononco estas ĝusta ĉi-okaze, sed ekzemploj de la dua prononcmodelo ekzistas. La tria modelo tute ne ekzistas en mia lingvaĵo, sed ŝajne POK uzas ĝin, ĉar li iam plendis, ke li ne povas distingi inter *KD* kaj *kodo*, dum por mi (kaj multaj aliaj) tiu distingo estas tre klara: [ko' do'] kaj [kodo]. Por mi la pluralo de *KD* [ko' do'] estas *KD-oj* [ko' dooj].

NOTU: Esperantistoj ŝajne spertas grandajn problemojn pri la angla esprimo *CD-ROM*. En *Esperanto* (1996, p. 113) oni preskaŭ trafis per "komputila nurlega KD", sed la vorto *nurlega* estas balasto: KD estas ja normale nurlega! La mallongigo *KKD* ŝajne estas uzata ne nur de mi.

***kern/o** [...] **magnet∼a memorilo** KOMP Speco de komputila memorilo, uzata inter 1955 k 1975, kiu konsistis el ringetoj, magneteblaj en unu el du direktoj, ĉe la kruciĝoj de latiso el dratoj.

NOTU: Ĝi estas *feritkerna memorilo* laŭ KBT (203), sed *magnetkerna* (POK) ŝajnas pli bona. Mi ne sukcesis ekscii, ĉu la ringetoj vere estis el ferito; oni devas atenti, ĉar la angla vorto *ferrite* estas plursenca, kaj nur unu el ĝiaj sencoj respondas al *ferito* en Esperanto.

kilo/. Pref., simb. k, kun la signifo: *1 mil* (10^3)*: *∼gramo* (kg)*, *∼metro* (km)*, ∼herco* (kHz)*, ∼volto* (kV). **2** KOMP (pp la grando de komputila memorilo) 1024 (2^{10}): *∼bajto* (kB), *∼bito* (kb). ▹ *mili/, mega/.*

klak^{3}i [...] **al∼i** (tr). KOMP Indiki ion sur komputila ekrano, movante la musmontrilon sur ĝin k premante musklavon: *al∼i menuon, vorton en hiperteksto.*

klasik^{1}a [...] **3** Rilata al tiparo, en kiu la literoj estas rektaj kun serifoj k forta kontrasto: *∼a fasono, tiparo*; *∼a familio* (tipara familio, en kiu la baza fasono estas ∼a). ▹ *kursivo, roma.* [...]

NOTU: POK konvinke argumentas, ke la nomo *klasika* estas pli taŭga ol la nomoj *antikva* kaj *rom(an)a* uzataj en iuj lingvoj.

***klav/o 1** Plateto, kiun oni premas por funkciigi muzikilon: *[...].* ▹ *klapo.* **2** Unu el la butonoj en ∼aro de tajpilo aŭ komputilo: *eniga ∼o* (por signi, ke enigaĵo estas preta); *sago∼o* (por movi la tajpmontrilon); *majuskla ∼o*; *retropaŝa ∼o*; *forviŝa ∼o*; *senpaŝa, morta ∼o* (por modifi la sekvontan signon); *rego∼o*; *makro∼o.* ▹ *bremso.* **3** Ŝaltilo kun la formo de tabuleto: *morsa ∼o.* ▹ *butono.* **∼aro.** Aro de ∼oj por funkciigi aparaton: *∼aro de orgeno, de komputilo*; *nombra sub∼aro.* **reĝim∼o** ∼o 2, kiu ŝanĝas la efikon aŭ signifon de aliaj ∼oj: *baskula reĝim∼o* (kiu post unufoja premo efikas al sekvaj ∼opremoj, ĝis oni premas ĝin denove); *momenta reĝim∼o* (kiu efikas, nur dum ĝi estas premata). ▹ *baskulo.*

NOTU: Laŭ mia memoro, klavo de piano ne havas risorton.

NOTU: POK preferas *enen-klavo* anstataŭ *eniga klavo.* Alia propono estas *sendoklavo.* Malgraŭ siaj problemoj, la esprimo *eniga klavo* ŝajnas esti ankoraŭ la plej konata kaj uzata.

NOTU: POK uzas la esprimojn *nefiksa reĝimklavo* kaj *fiksiĝima reĝimklavo.* Laŭ mi *baskula reĝimklavo* estas pli bona ol la dua, sed mi ne estas tre certa pri *momenta reĝimklavo.*

Kobol/o KOMP Programlingvo por komerca aplikado el la 1950-aj jaroj (COBOL).

kod/o^Z [...] **2** Sistemo, laŭ kiu signoj aŭ grupoj de signoj anstataŭas aliajn signojn, vortojn aŭ nociojn, por signalado, konciza komunikado aŭ ĉifrado: *internacia ∼o por mara signalado*; *morsa, binara, genetika ∼o.* **3** Grupo de literoj aŭ ciferoj uzata por distingi ion: *poŝta ∼o*; *UEA-∼o* (kontonumero ĉe UEA); *ISBN-∼o de libro* (libronumero). **∼i** (tr). Esprimi per ∼o: *∼ita mesaĝo.* **∼ero** = ∼vorto. [...] **mal∼i** (tr). Transskribi ∼itan tekston por redoni la originalon. **∼vorto.** Unu el la signoj aŭ grupoj de signoj en ∼o 2. **strek∼o** ∼o uzanta vicon da diverslarĝaj paralelaj strekoj, kiujn oni skanas per lumfasko aŭ legas per lumplumo, ĉefe uzata en etikedoj sur varoj aŭ sur libroj en biblioteko: *strek∼legilo.*

NOTU: La vorto *kodero* estas de Jelenc. Ĝenerale la vorto *kodvorto* (jam registrita en PIV) estas preferinda, sed la vorto *kodero* estas utila en kunteksto, en kiu oni parolas konstante ankaŭ pri alispecaj vortoj (lingvaj aŭ komputilaj), kaj la *kodvortoj* ne estas tiuspecaj vortoj, do la esprimo *kodvorto* konfuzus. POK proponas uzi la vorton *kodono*, analogie al la genetika termino en PIVS.

kolaps/o [...] **3** KOMP Ĉeso de la funkciado de komputila programo pro eraro: *relanĉi programon post ∼o.* ▹ *misfino, paneo.* [...]

NOTU: Movu la medicinan vinjeton. La vorto *kolapso* havas multajn nemedicinajn sencojn (ekz. pp konstruaĵo aŭ entrepreno).

***kom/o** [...] **2** Tiu signo uzata en la skribado de nombro por apartigi la entjeran k frakcian partojn (ekz. 2,1 = 2 k 1 dekono). ▹ *decimala, punkto.* [...] **fiks∼a** KOMP Rilata al prezento de nombro, en kiu la pozicio de la ∼o estas fiksa k implicita: *fiks∼a prezentado, dateno, variablo.* [...] **glit∼a** KOMP Rilata al prezento de nombro, en kiu la pozicio de la ∼o varias k estas eksplicite prezentata: *glit∼a dateno.* ▹ *eksponento, mantiso.* **sub∼o** TIP Kromsigno kun la formo de eta ∼o, uzata sub la literoj G, K, N, S, T en la latva lingvo k sub S, T en la rumana: *en la latva oni uzas kun minuskla G super∼on anstataŭ sub∼o.*

NOTU: Oni ne bezonas la vinjeton SCI por senco 2 de *komo*; temas pri ĉiutagaĵo, mi pensas, almenaŭ en industriaj landoj. Mi aŭdis, ke internacia normo preferas komon, ne punkton, en tiu funkcio, kvankam ĝi allasas ambaŭ. POK skribas pri *on-punkto.*

NOTU: Eble pli bonaj terminoj estus *fikseksponenta* kaj *varieksponenta* ...

***komand/i** [...] **~o** [...] **4** KOMP Ordono al komputila sistemo, ĝenerale de la uzanto k por tuja plenumo: *la ~o por forlasi la programon estas X*; *~odosiero.* ▷ *instrukcio.*

***kombin/i** [...] **~ilo** KOMP Cifereca cirkvito, kiu realigas bulean funkcion: *AŬ-, KAJ-, MAL-, NE-, NEK-~ilo.*

NOTU: Ĝi estas *pordo* laŭ Bertin, *logika elemento* laŭ POK, kaj *cirkvitero* laŭ KBT. Oni povus konsideri ankaŭ la rusismon *valvo*, sed mia elekto estas *kombinilo.*

koment/i [...] **~o** [...] **4** KOMP Vortoj en komputila programo, kiujn ignoras la komputilo, sed kiuj servas por helpi homon kompreni la programon. [...]

NOTU: Hodiaŭ *komenti* ŝajnas pli ofta ol *komentarii*, do mi sugestas, ke oni movu la difinojn tien.

NOTU: En programado oni povas *(for)koment(ig)i* instrukciojn.

***komerc/i** [...] **~aĵo** KOMP ~e vendata komputila programo, kontraste al publikaĵo aŭ propagaĵo. [...]

[kompatibil/a] [Ne enmetu.]

NOTU: ... kion oni pensu pri la vorto *kompatibila* (interkonvena, kongrua) el PIVS?

Ĝi ŝajne finiĝas per la sufikso -il', sed ĝi tute ne estas ilo. Efektive, *-ibil'* evidente estas speco de franca *-ebl'*. Tamen la afero neniel rilatas al kompato!

Iel ĝi trafe reprezentas la kulminon de Esperanta leksikografio.

Sed por vere taksi la altan nivelon de nia plej prestiĝa, plej profesia, plej akademia Suplemento, necesas legi ankaŭ la difinon: "Kvalifikas du sistemojn (biologiajn, elektronikajn...), kiuj povas akordiĝi".

Enestas pluraj el la klasikaj evitendaĵoj: Adjektivo estas difinita per sensubjekta frazo anstataŭ per adjektivo. Tute ne estas klare, kiajn sistemojn oni aludas per "biologiajn, elektronikajn...". (Se temas pri inteligentotesto "Kio sekvas en ĉi tiu serio?", laŭ mi mankas iom da informo.) Amaso da maltrafa balasto.

Mankas ekzemploj pri "kompatibila", sed la ekzemploj pri "kompatibileco" apenaŭ rilatas al "sistemoj", escepte de "kompatibileco inter komputoro k ĝiaj aneksoj" ... kiam ne vere temas pri "du".

Kompreneble la vorto "anekso" nenie estas difinita: unu el la plej nepraj leksikografiaj evitendaĵoj plej trafe trafitaj, kvazaŭ la aŭtoro plej lerte volus montri, kiel oni ne faru vortaron.

Oni tamen devas ridi.

kompiler/o (evi) = tradukilo.

NOTU: POK nomas la terminon *kompilero* "aĉega". Ĉe KBT estas *kompililo*, sed POK prave atentigas, ke tio sugestas ion tute alian al homo, "kies lingvosento ne estas fuŝita per la fakĵargono".

komplement²o [...] **5** KOMP Nombro, kiu, adiciite al donita nombro, donas aŭ nul en ĉiu ciferpozicio (ĝisbaza ~o) aŭ la maksimuman ciferon en ĉiu pozicio (laŭcifera ~o): *~o ĝis du* (duuma ĝisbaza ~o); *~o ĝis unu* (duuma laŭcifera ~o); *~a prezento de negativa nombro.* [...]

komplik¹i [...] **~o** KOMP Malfacileco de problemo, mezurata per la komputaj rimedoj bezonataj por solvi ĝin: *polinoma ~o*; *memor~o, tempo~o*; *~oteorio.* ▷ *komputebla.* [...]

NOTU: Ĉe POK estas *kompliko* kaj *komplikteorio.* Eble iu opinios, ke devas esti *komplikeco*, ĉar la radiko estas verba.

[kompt/i] [Ne enmetu.]

NOTU: Forigu tiun ĉi fuŝaĵon! Sufiĉas al ni jam *nombri, mezuri, kalkuli* kaj *komputi.*

komput/i (tr). **1** KOMP MAT Kalkuli per aplikado de algoritmo, precipe per ~ilo: *~i milionon da decimaloj de π*; *~i paskodatojn laŭ Viktorio*; *proceduro, kiu ~as inverson de matrico.* **2** (ark) Nombri aŭ mezuri. **~a.** Rilata al ~ado: *~a sistemo*; *~a centro* (~ejo); *~a povumo*; *~a lingvistiko* (per~ila esplorado pri homa lingvo). **~o.** Ago de ~anto aŭ ~ilo. **~ado. 1** Ago de iu, io ~anta: *taskvica, tuja ~ado*; *tele~ado.* **2** Aplikado de ~iloj: *efikoj de ~ado al la Tria Mondo.* ▷ *programado.* **~ebla** MAT Determinebla per algoritmo: *teorio pri ~eblaj funkcioj*; *~ebla aro* (aro, kies membroj estas listigeblaj per algoritmo). ▷ *decidebla.* **~ejo.** Entrepreno aŭ fako plenumanta ~adon. **~iko** KOMP Scienco pri ~ado. ⇒ *informadiko.* **~ikisto** KOMP Fakulo pri ~iko. **~ilo 1** Aparato, kiu aŭtomate prilaboras datenojn laŭ instrukcioj: *persona ~ilo*; *teko~ilo* (kunportebla ~ilo); *mikro~ilo*; *~ilego*; *enkonstruita ~ilo*; *per~ila desegnado, projektado, kompostado, instruado, tradukado*; *~ila sistemo*; *~ila reto*; *~ila klero*; *~ile helpata*; *~ile legebla.* ▷ *dateno, programo, kalkulilo.* **2** (ark) Nombrilo aŭ mezurilo. **~ilisto.** Homo, kiu profesie okupiĝas pri ~iloj. **~isto 1** Homo, kiu profesie okupiĝas pri ~ado. ▷ *programisto.* **2** Homo profesie faranta rutinajn kalkulojn laŭ pretaj formuloj. **~opreta.** Prezentita en formo taŭga por ~ado, ~ile legebla: *~opreta dokumento.*

NOTU: Mi vidas, ke la matematikistoj enmetis mian artikolon "kun ŝanĝetoj". Tiuj ŝanĝetoj ŝajnas esti nur ellaso de iuj ekzemploj. La ekzemplo *tekokomputilo* ŝajnas al mi inkluzivinda, ĉar ĝi estas preskaŭ ĉiutaga objekto hodiaŭ.

NOTU: Mi reverkis la artikolon de POK el la matematika revizio de PIV pro jenaj kritikoj: (1) La esprimo "solvi matematikan problemon" donas malĝustan impreson, ĉar tipa matematika problemo estas pruvi aŭ malpruvi iun aserton. (2) La unua Rimarko estas tro longa por PIV, kaj kelkaj informoj estus pli bone donitaj per ekzemploj, aŭ en la artikolo pri *kalkuli.* (3) La ekzemplo "la revuo "Internacia Komputado"" ne tre bone servas por ilustri la signifon de *komputado.* (4) Ankaŭ la dua Rimarko estas iom longa; pli bone estas meti referencon al *kalkulilo* kaj taŭgajn ekzemplojn ĉe ambaŭ. (4) La esprimoj *komputila sistemo*, *komputile helpata* kaj *komputilizi* ne estas registrindaj kiel apartaj leksikografiaj unuoj, laŭ mi.

NOTU: Mi kutimas paroli pri *lingviko* kaj *komputa* *lingviko* (mia fako), sed mi suspektas, ke oni volos korekti la vorton *lingviko* al *lingvistiko*.

NOTU: Evidente, pro la arkaikiĝo de la dua senco de *komputi*, kvankam mi ne scias, ĉu PIV vere spegulis la uzadon, kaj ĉu la lingvo vere ŝanĝiĝis, estas konsilinde formovi multajn subartikolojn el la artikolo en PIV.

[komputer/o] [Forigu.]

NOTU: Malgraŭ sia PIV-eco *komputero* apenaŭ estas uzata. (Vidu la antaŭparolon de KBT.) Cetere, la ĝusta formo de la vorto troviĝas apude laŭ la alfabeta sinsekvo, do la uzanto vidos la ĝustan formon kaj povos diveni, ke -er' estas speco de angla -il'.

komputor/o = komputilo.

NOTU: La vorto *komputoro* estas iomete uzata.

***komunik/i** [...] **mult~ila** Uzanta k kombinanta diversajn ~ajn rimedojn: *en la nova mult~ila medio teksto nur ĝenus.* [...]

NOTU: Citaĵo el Monato.

***kon/i** [...] **~igilo** KOMP Ano de datenopo, per kiu oni distingas ĝin de aliaj datenopoj k referencas al ĝi: *ĉef~igilo*; *krom~igilo.* [...]

NOTU: La esprimo *konigilo* estas de KBT (166). Certe ekzistas multaj aliaj ebloj: distingilo, identigilo, indeksvaloro, referenco, ŝlosilo, trovilo, ...

kondukt/i [...]

NOTU: Ĉi tiu artikolo en PIV bezonas multe da laboro. Notu ekzemple la nesubstitueblan difinon de *plilongiga ŝnurkonduktilo*; cetere mi dubas, ĉu tiu esprimo estas efektive uzata. Mankas la vorto *duonkonduktilo*, kiu estas grava kaj efektive uzata; ĉe *konduktanto* estas io pri *duonkonduktanto*, sed ĝi ŝajnas esti malĝusta: karbo kaj grafito ne estas duonkonduktiloj, mi pensas. En PIVS estas *presita konduktilaro* kun babilaĵo, kiu apenaŭ similas al vortara difino; mi rekomendas ne enmeti ĝin. Mi uzis la esprimon *cirkvita tabulo* aliloke.

konekt/i [...] **paralela ~o.** [Forigu.] **seria ~o.** [Forigu.] [...] **ter~o** [Forigu.]

NOTU: Paralela kaj seria konektoj estas konektoj, kiuj estas paralelaj kaj seriaj; menciu ilin eble kiel ekzemplojn post la difinoj de *paralela* kaj *seria*, sed ne ĉi tie. *Terkonekto* estas evidenta kunmetaĵo el senco 8 de *tero* kaj ne bezonas apartan kvarlinian difinon.

kongru/i [...] 4 TEK Plenumi saman funkcion k esti interŝanĝebla kun; interkonveni: *la nova programo plejparte ~as kun la malnova.* **~a.** ~anta: *~aj trianguloj*; *~aj komputiloj.*

***konsil/i** [...] **~ilo** KOMP Komputila programo, kiu aplikas regulojn al donitaj informoj por fari inteligentajn rekomendojn aŭ decidojn. ▹ *artefarita intelekto.* [...]

kontinu^{4}a. **1** [...] en spaco: *~a muro*; *~a linio*; *~a papero*; *[...]*

kontrast^{1}o **1** [...] **2** TIP Proporcio inter la larĝoj de la plej k malplej dikaj strekoj de tiparo: *tipara familio kun forta tipara ~o*; *senserifaj k tajpecaj tiparoj havas minimuman ~on.* ▹ *pezo, klasika.* [...]

NOTU: En la artikolo en PIV oni forgesis mencii la oftan esprimon *kontraste al.*

***konven/i** [...] **inter~i** TEK (pp aparato, programo ks) Esti kapabla funkcii kun alia aparato, programo ktp: *la malnova programo ne inter~as kun la nova mastruma sistemo.* ▹ *kongrua.* ⇒ *interfaco.* **inter~a.** Inter~anta: *~aj aparatoj.* [...]

NOTU: KBT difinas la vorton *interkonveneco* (130) kun la senco, kiun mi donas al *kongrua.*

***kopi/i** [...] **3** = presi 3. [...] **sav~o** KOMP Rezerva ~o de datenoj por protekti kontraŭ perdo de la originalo: *ĉiam faru sav~on.* [...] **tele~i** = faksi. **tele~ilo** = faksilo.

NOTU: *Savkopio* estas por POK *restaŭrkopio.* KBT difinas nur la nocion *datena sekurigo* (83). Ekzistas ankaŭ la esprimoj *protekta kopio* kaj *rezerva kopio.* La esprimon *savkopio* pravigas tradicio de tiaj kunmetaĵoj en Esperanto: savarmeo, savboato, savbuo, savelirejo, savjako, savoklapo, savŝnuro, savzono.

***korn/o.** [...] **5** TIP Supersigno kun la formo de bova ~o: *dekstra ~o* (´); *maldekstra ~o* (`); *du~o* (˝; = pinta hoketo). ▹ *cirkumflekso, malapostrofo.* [...]

NOTU: BENSON kaj POK preferas la vorton *dukorno* anstataŭ la PIV-a *duobla korno.*

NOTU: Mi rekomendas reverketi la artikolon pri *akuta*: dekstra korno ja montras *akutan* (pli ĝuste: malvastan) vokalon en la franca, sed en la hungara ĝi montras longan vokalon, en la hispana ĝi montras akcenton, kaj en iuj lingvoj ĝi montras tonon, ktp.

***kramp/o** [...] **3** TIP Skriba k tipografia signo, montranta komencon k finon de ia grupo, speciale de parentezo: *vi povas nur apud la diritaj vortoj skribi en ~oj ilian tradukon*^{Z}; *ni signas la fremdajn sonojn per literoj en ~oj*^{Z}; *rondaj (()), angulaj (<>), rektaj ([]), kunigaj ({}) ~oj; malferma, ferma ~o; ek~o, fin~o.* ▹ *pliosigno.* [...]

NOTU: Oni ne bezonas apartan subartikolon pri *kuniga krampo.* (Notu, ke la strukturo de la PIV-a artikolo estas malnorma.)

krement/i KOMP Ŝanĝi la valoron de (variablo) per konstanta diferenco: *~i nombrilon per 1.* **~o** **1** La ago de iu, kiu ~as. **2** La kvanto, per kiu oni ~as. **al~i.** ~i aldonante konstantan kvanton: *al~o.* **de~i.** ~i deprenante konstantan kvanton.

NOTU: Neologismo proponita de POK.

ku/o. [...]

NOTU: Mi neniam vidis kuon kiel mallongigon de kilogramcento. Ĉu vere? Ĉu en Esperanto?

kurent/o [...]

NOTU: Ĉi tie estas pluraj mislokitaj difinoj. Evidente la difino de *altfrekvenca* ne estu en la artikolo pri *kurento*! Sed ankaŭ pri *portanta kurento, kurentoelemento, kurentintenso* mi forte dubas. Ekzistas ankaŭ *portanta ondo*, ekzemple, do pli bona estus difino ĉe *porti.*

kurs^{1}o [...] **~i** Iri laŭ ~o. [...] **re~i** **1** Reiri laŭ la antaŭa ~o. **2** KOMP MAT Referenci al si mem, kiel en re~o. **re~o** **1** KOMP La vokado de proceduro dum la plenumado de tiu sama proceduro; = memvokado: *re~o estas karakteriza pri funkciema programado.* ▹ *iteracio.* **2** MAT La uzado en difino de pli simpla ekzemplo de la afero difinata; memreferenco. **3** MAT Matematika pruvmetodo, en kiu oni pruvas asertojn $A(n)$ unue pruvante $A(1)$ (la re∼an komencon) k poste pruvante, ke $A(n)$ implicas $A(n+1)$ por ĉiu n (la re∼a paŝo); = indukto. **4** MAT Simila pruvmetodo por bonorditaj aroj, en kiu oni pruvas asertojn $A(n)$ pruvante, ke $A(n)$ estas vera, se $A(m)$ estas vera por ĉiu $m < n$; = indukto. **re∼a** Rilata al re∼o: *re∼a proceduro, voko*; *re∼a difino de* $n!$ *kiel* $n\ (n-1)!$, *re∼a formulo*; *re∼a pruvo.*

NOTU: La vorto *rekurso* estas en KBT, sed ĉi tiu propono pri derivo laŭ la vojo “kurso – kursi – rekursi – rekurso” estas de mi. La verbo *kursi* ne estas jam dokumentita, sed ĝi ŝajnas plene natura derivaĵo, kaj la verbo *kursadi* estas eĉ zamenhofa. Rivalaj proponoj estas *rikuro* kaj *rekursio*, kiuj ĝenerale ricevas de siaj proponantoj ankaŭ la aldonan (kaj laŭ mi konfuzan) sencon “komputebla” (aludante unu el la multaj manieroj difini tiun nocion).

kursiv[1]**o** **1** Stilo de manskribado, en kiu la literoj estas klinitaj dekstren. **2** TIP Tipara fasono, en kiu la literoj estas klinitaj dekstren k havas la formon de manskribitaj literoj, ofte uzata por emfazo aŭ por fremdaj vortoj en teksto: *la ekzemploj estas ∼e presataj.* ▷ *oblikva, rekta, kaligrafio, klasika.* **∼igi** TIP Presi per ∼aj literoj: *∼igu la citaĵojn.*

kursor/o = montrilo 2.

***labor/i** [...] **[aropa pri∼o]** [Ne enmetu.] **centra pri∼ilo** KOMP = procesoro.

NOTU: La klarigo en PIVS pri *aropa prilaboro* ne estas tre klara, sed verŝajne temas pri *taskvica komputado.*

lanĉ/i [...] **3** KOMP Ekfunkciigi komputilan programon: *∼i aplikan programon.* ▷ *munti, ruli.*

***leg/i** [...] **3** KOMP Preni datenojn el memorilo: *programo ∼as la datenojn de disko en la ĉefmemoron*; *instrukcio ∼as valoron el ĉefmemoro en dateningon.* ▷ *skribi, ŝargi.* [...] **∼ilo** KOMP Aparato por enkomputiligi datenojn: *trukarto∼ilo*; *laserdisk∼ilo.* [...] **tekst∼ilo** KOMP Aparato por enkomputiligi presitan aŭ manskribitan tekston per optika signorekono. ▷ *bitigilo.* [...]

***lig/i** [...] **∼aĵo** **1** [...] **2** TIP Grupo de kun∼itaj literoj farata per unu tipo aŭ prezentata per unu signobildo: *multaj tiparoj havas ∼aĵojn por fi, fl, ffi k ffl.* [...]

NOTU: Verŝajne ankaŭ ß kaj æ estas ligaĵoj.

NOTU: La vorto *ligilo* estas ofte uzata en komputiko, same kiel ĝi estas ofte uzata en la komuna lingvo, kun diversaj metaforaj sencoj. Ne indas aparte registri ĝin, ĉar ĉiuj sencoj estas jam kovritaj de senco 1 en PIV (eventuale post forigo de la vorto *fizike*).

ligatur/o **1** [...] **2** TIP = ligaĵo.

line/o [...] **3** EL Konduktiloj uzataj por porti elektran energion laŭ fiksita vojo: *unuopa, duopa ∼o*; *kontakto∼o de trajno aŭ tramo.* ▷ *drato, kablo.* **4** TEL Konduktiloj aŭ optika fibro uzataj por porti telekomunikajn signalojn: *telefon∼o*; *alstacia ∼o*; *unu ∼o povas havi multajn kanalojn*; *rekt∼a, sen∼a uzado de aparato.* ▷ *plekti.*

NOTU: Verŝajne estas utile apartigi la energian kaj komunikan sencojn de *lineo*, sed ĉu la detala terminologio en la PIV-a artikolo estas aktuala aŭ utila? Mi dubas.

NOTU: La esprimoj *rektlinea* kaj *senlinea* estas proponoj de POK por traduki la anglajn esprimojn *on-line* kaj *off-line*. Ili ne ricevas proprajn difinojn, ĉar ili ankoraŭ ne estas ĝenerale uzataj, kaj laŭ mi ili apenaŭ estas bezonataj en Esperanto: preskaŭ ĉiam la ĝusta traduko de *on-line* estas *konektita*, *rekte konektita*, *rekta* aŭ simile, kaj bona traduko de *off-line* estas, krom la malo de tio, ankaŭ *aŭtonome.* En la angla oni ofte uzas tiajn esprimojn pli pro modo aŭ ĵargonemo ol pro vera utilo. Interesa ekzerco estas legi la respondajn artikolojn en *Oxford English Dictionary* kaj traduki la tieajn ekzemplojn.

***lingv/o** [...] **4** KOMP MAT Difinita aro de signoĉenoj, ofte kun difinita signifo: *formala ∼o* (kontraste al homa ∼o); *regula, senkunteksta ∼o.* [...] **cel∼o.** ∼o, en kiun oni tradukas. **font∼o.** ∼o, el kiu oni tradukas. **pont∼o.** ∼o, en kiun oni tradukas ion por poste plu traduki ĝin en alian ∼on. [...] **maŝin∼o** KOMP ∼o, kiun rekte interpretas komputila aparato. ▷ *asembla lingvo.* **program∼o** KOMP Formala ∼o, en kiu oni skribas komputilajn programojn: *altnivela, ordonema, deklarema, funkciema program∼o.* ▷ *instrukcio, tradukilo.* [...]

NOTU: Ĉe POK estas *funkcia programlingvo* anstataŭ *funkciema programlingvo.* Li difinas ankaŭ la terminon *programada lingvo* (programlingvo por programado fare de homo) apud *programlingvo.*

Lisp/o KOMP Programlingvo aperinta en la 1950-aj jaroj k multe uzata por artefarita intelekto (LISP).

list[1]**o.** [...] **dissendo∼o** **1** ∼o de adresoj, al kiuj oni dissendas cirkuleron. **2** KOMP Forumo en komputila reto, funkcianta tiel, ke mesaĝoj senditaj al iu centra adreso aŭtomate dissendiĝas al ĉiuj abonantoj. ▷ *retnovaĵoj.* **ligil∼o** KOMP Datenstrukturo prezentanta ∼on per datenopoj, el kiuj ĉiu enhavas referencon al la sekva datenopo. ▷ *ĉeno, vico.* [...]

NOTU: Mi trovis la vorton *ligillisto* ĉe POK. Ĉi tiu difino ja implicas, ke *ligilo* povas esti sinonimo de *referenco*, tamen, escepte de ĉi tiu kunmetaĵo, mi normale uzus la vorton *referenco.* (*Referenclisto* estus miskomprenebla.)

NOTU: Mia difino antaŭe tekstis “kiuj enhavas po referencon al”. Tiun uzadon de *po* mi lernis de William AULD, kiu iam rekomendis al mi “ili (ĉiuj) portis po pafilon sub la brako” aŭ simile. Sed la nova teksto sen *po* estas same bona.

***liter/o** [...] **∼a-cifera** KOMP (pp signaro, kodo aŭ datenoj) Estanta ∼o aŭ cifero, aŭ rilata al ∼oj aŭ ciferoj. ⇒ *ĉeno.* [...] **∼umilo** KOMP Programo aŭ parto de programo por kontroli ortografion per vortlisto de la koncerna lingvo. [...] **et∼o** ∼o, kiu ne estas ĉef∼o. [...]

NOTU: En KBT estas *alfanumera* (17), sed ĉe POK estas *litercifera.*

***magnet/o** [...] **∼a** [...] **2** [...]: *[...]*; *∼a bendo*; *∼a strio* (ekz. sur bankokarto). [...]

majuskl/o TIP Litero el la serio A, B, C, uzata ekz. en la komenco de frazo aŭ nomo, en titoloj, aŭ por emfazo: *la nomoj de monatoj ne bezonas ∼on*; *skribu la familian nomon ∼e.* ▷ *ĉeflitero, minusklo.* **∼eto** Litero kun la formo de ∼o, sed samgranda kiel minusklo de la sama serio; = versalo.

makro/ [...] **∼o** KOMP Simbolo aŭ frazo en la teksto de komputila programo ks, kiu estas anstataŭita per antaŭe difinita teksto antaŭ la plua prilaboro de la teksto: *∼difino*; *∼traktilo*; *∼substituo.* **∼instrukcio** KOMP ∼o uzata anstataŭ instrukcio en komputila programo. **∼klavo** KOMP Klavo, al kiu uzanto de komputilo povas atribui sinsekvon de klavopremoj por poste uzi ĝin kiel mallongigon.

NOTU: En KBT estas *makro* (191), sed *makroo* ŝajnas pli bona.

makulatur/o^{Z} **1** [...] **2** KOMP Komputila memoro okupata de ne plu bezonataj datenoj.

mantis/o 1 MAT [...] **2** KOMP En glitkoma prezento de nombro, la ciferoj de la nombro sen indiko pri la pozicio de la komo. ▷ *eksponento.*

[maprod/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Oni ne bezonas akronimon por nocio tiom malofta. Verŝajne la aŭtoro de tiu difino en PIVS pensis pri la mallongigo *DOS*, kiu estas elemento en la nomo de pluraj (disk)mastrumaj sistemoj. Tamen oni ĝenerale ne tradukas nomojn de programoj. (Ofte ili estas registritaj markoj.)

marĝen^{1}**o** [...] **krom∼o** TIP Kroma spaco en la komenco de linioj de teksto. ▷ *deŝovi, alineo.*

NOTU: Ĉapelilo uzas la esprimon *krommarĝeno.*

***mask/o** [...] **7** FOT Folio uzata por kovri parton de fotografia surfaco, dum la nekovrita parto estas impresata per bildo. **8** Folio kun truoj metata sur skribaĵo por vidigi nur difinitajn partojn de la teksto. **9** KOMP Ĉeno de bitoj, kiun oni per bulea operacio kombinas kun dateno por elekti parton de ĝi. [...]

NOTU: Mi reverkis sencon 7 el PIVS, kiu estis terure PIV-eca kun sia komplika gramatiko kaj detaloj pri la materialo ("kartono, plasto aŭ metalo"). Ankaŭ senco 8 estas el PIVS, kvankam ĝi ne ŝajnas tre valora: pli grandaj nacilingvaj vortaroj ne havas ĝin. Senco 9 estas la preteksto por mia interveno; ankaŭ ĝi estas malgrava.

***mastr/o** [...] **∼uma sistemo, ∼umilo** KOMP Programaro, kiu direktas la funkciadon de komputilo, asignante memoron k tempon al taskoj, administrante dosierojn, provizante interfacon por en- k el-igado, ks. [...]

NOTU: La esprimo *mastruma sistemo* estas jam vaste uzata en Esperanto. Ne necesas mencii la aliajn proponojn, kiuj aperis en PIVS.

matric/o^{Z} [...] **5** MAT [...]. ▷ *tabelo.* [...]

mega/. Pref., simb. M, kun la signifo: **1** miliono (10^6): *∼omo* (MΩ), *∼volto* (MV), *∼tuno.* **2** KOMP (pp la grando de komputila memorilo) 1047576 (2^{20}): *∼bajto* (MB), *∼bito* (Mb). ▷ *kilo/, giga/.*

***memor/i** [...] **∼o** [...] **4** KOMP Parto de komputilo, en kiu datenoj estas tenataj: *ĉef∼o* (rekte adresebla de la ĉeforgano); *ekstera ∼o* (en flankaparato); *virtuala ∼o*; *okupi, malokupi ∼on*; *∼hierarkio*; *∼kapacito*; *∼protekto*; *registri valoron en ∼o*; *legi datenojn en la ∼on*; *ŝargi la ∼on per datenoj.* ▷ *dateningo, staplo.* [...] **∼ilo** KOMP Aparato por teni datenojn: *duonkonduktila ∼ilo*; *magnetdiska, magnettavola ∼ilo*; *rekte alirebla, ajnvica ∼ilo*; *laŭvica ∼ilo*; *asocieca ∼ilo*; *modifebla ∼ilo*; *nurlega ∼ilo*; *viŝebla programebla nurlega ∼ilo*; *magnetkerna ∼ilo.* ▷ *ĉelo.* [...] **[komputer∼ilo]** [Forigu.] **[modifebla ∼o]** [Ne enmetu.] **[nurlegebla ∼o]** [Ne enmetu.] **[primara ∼o]** [Ne enmetu.]

NOTU: Ekzistas multaj alternativoj: memoro (memorilo); ĉefmemoro (centra memorilo, primara memoro); ekstera memoro (krommemoro, vicmemoro); memorprotekto (memorilŝirmilo); memorilo (memoro); rekte alirebla memorilo, ajnvica memorilo (ajnvice atingebla memoro, rektatinga memorilo); laŭvica memorilo (seriatinga memorilo); nurlega memorilo (NLM, nurlegebla memoro, fiksa memorilo, konstanta memorilo, neŝanĝebla memorilo); magnetkerna memorilo (feritkerna memorilo).

NOTU: Mi mencias multajn terminojn nur kiel ekzemplojn, ĉar la signifo estas klara al iu, kiu jam konas la nocion, kaj kelkfoje tro teknika por ĝenerala vortaro. Provizore mi ellasas: energi-(ne)dependa memoro; kadukiĝema memoro, memoradministrilo.

NOTU: Mi rekomendas ŝanĝi de *spirito* al *menso* en la cetero de la artikolo en PIV!

menu^{1}**o** [...] **3** KOMP Surekrane montrata listo de ebloj, el kiuj la uzanto povas elekti per la muso aŭ premante klavon: *∼strio* (kion oni alklakas por aperigi ∼on), *tir∼o* (kiu malaperas, kiam oni ĉesas premi la musklavon), *fal∼o* (kiu restas post premo de la musklavo).

NOTU: Mi ne havis tre bonan motivon por *falmenuo* anstataŭ *pendmenuo.* Alian specon, *ekmenuo*, mi ne mencias.

mesaĝ/o [...] **ret∼o** KOMP ∼o en retpoŝto.

***met/i** [...] **en∼i** [...]: *[...]*; *en∼i datenojn en komputilon.* ▷ *enigi.* [...]

NOTU: La vorto *enmeti* estas efektive uzita pri la enigado de datenoj en komputilon kaj registrita kun tiu senco en kelkaj dulingvaj vortaroj. Por faka uzado *enigi* ŝajnas preferinda, sed la paro *enmeto* kaj *eligo* donus pli da klareco dum parolado ol *enigo* kaj *eligo.*

minus^{Z}**.** [...] **∼signo.** La signo -, montranta subtrahon aŭ negativan nombron. ▷ *haltostreko, signumo.*

minuskl/o TIP Litero el la serio a, b, c, kontraste al majusklo.

NOTU: Oni desegnas minusklojn helpe de kvar horizontalaj linioj. Mi trovis en Monato (decembro 1995, p. 30) frazon, en kiu oni mencias tiun detalon: "Se ili nur uzu literojn kiuj havas nek kolon (kiel b, l, h, f,... kaj tiel), nek voston (kiel j, g,... plu), [...] eblus ankoraŭ pli limigi la interlinian spacon"

***model/o** [...] **4** SCI Simpligita prezento aŭ priskribo de la esencaj ecoj de sistemo aŭ procezo, uzata por kalkulado, prognozado aŭ esplorado: *matematika ∼o*; *∼o de atomo, de la ekonomio*; *ond∼o de lumo*. [...] **∼i** [...] **3** SCI Fari ∼on pri io: *∼i trafikon, la atmosferon.* ▷ *simuli.*

modem/o KOMP Aparato por sendi k ricevi ciferecajn datenojn per analoga lineo, ekz. telefonlineo, konvertante ilin al sonoj. ▷ *modulilo.*

NOTU: Modemoj funkcias diversmaniere. Mi pensas, ke la specoj plej multe uzataj hodiaŭ uzas fazmoduladon de ondo kun fiksita frekvenco, sed kelkaj kunmiksas diversfrekvencajn ondojn, kaj la malnovaj ŝaltas inter du frekvencoj. Ne estas klare, ĉu ĉi tiuj du lastaj vere *modulas*, ĉar mankas "portanta ondo".

[modjul/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Oni kreas multe pli da problemoj inventante tian paronimon ol pro la plursenceco de *modulo*; vidu la konfuzon kaŭzitan de *rakedo* kaj *raketo*, *etiketo* kaj *etikedo*, ktp. Ne estas klare, kial ĝuste tiu senco de *modulo* ricevu propran paroniman radikon.

modul¹i [...] **2** ELE Ŝanĝadi la amplitudon, frekvencon, fazon ks de portanta ondo aŭ kurento laŭ la preskribo de signalo, por tiel transsendi la signalon. **∼ado** [...] **3** ELE La ŝanĝado de ondo aŭ kurento por porti signalon: *amplitudo∼ado, frekvenco∼ado, faz∼ado.* **∼ilo** ELE Cirkvito aŭ aparato por ∼ado. ▷ *modemo.* **mal∼i** ELE Rehavigi la originalan signalon el ∼ita ondo aŭ kurento. **[mal∼ado]** [Forigu.]

NOTU: PIV uzas por *moduli* la vinjetojn de Telekomunikoj kaj Radiofonio. Sufiĉas ELE por kovri tiujn kaj ankaŭ KOMP ktp.

NOTU: La PIV-a difino de *malmodulado* ne estas bezonata. Simile oni ne bezonas apartan difinon de *malmodulilo*. (Ili estus same utilaj kiel la PIV-a difino de *piratino*!)

NOTU: PIVS eraras, metante komputikan sencon de *modulo* (= bloko) sub ĉi tiu verba radiko anstataŭ sub la substantiva.

NOTU: La uzado de la vortoj *preskribo* kaj *signalo* en ĉi tiu difino ne tute konformas al la difinoj de tiuj vortoj en PIV.

NOTU: Radiofa(nati)kulo povus proponi amason da esprimoj por diversaj specoj de modulado.

modul/o [...] **6** TEK = bloko. [La matematikistoj aldonis sencon 2 k movis 2, 3, 4 al 3, 4, 5.]

NOTU: Temas pri TEK, ne nur pri KOMP.

monitor/o [...] **5** (evi) = vidigilo.

NOTU: Mi indikas, ke ĝi estas evitinda, ĉar la ĉefa senco de *monitoro* estas aparato por kontroli aŭ observadi (ĝenerale ion foran), ekzemple televidilo uzata por kontroli bildon, dum ĝi estas sendata, aŭ simile.

***montr/i** [...] **∼ilo 1** Peco de aparato, servanta por ∼i: *la longa k la mallonga ∼iloj de horloĝo*; *∼ilo de kompaso, de manometro.* ▷ *nadlo.* **2** KOMP Marko sur ekrano, ∼anta, kie plenumiĝos funkcio: *tajp∼ilo* (∼anta, kie aperos la sekva signo); *mus∼ilo.* ▷ *muso.* **3** KOMP = referenco 3.

NOTU: Ĝenerale *tajpmontrilo* estas flagranta signopozicio, substreko, aŭ vertikala streko.

multipleksor/o = plektilo.

NOTU: La esprimo "tempo[-]divida multipleksorado" aperis en *Esperanto en Skotlando*, 167, p. 4.

munt⁴i [...] **3** KOMP Legi programon ks en la memoron de komputilo: *∼i presilzorgilon, tiparon.* ▷ *lanĉi, ŝargi.* [Movu 3 al 4.]

***mus/o 1** [...] **2** KOMP Komputila flankaparato, kiun uzanto movas sur la tablo, aŭ sur speciala mato, por tiel movi respondan montrilon sur la ekrano: *ĝenerale ∼o havas almenaŭ unu klavon, per kiu oni povas elekti funkcion ĉe la indikata loko.* ▷ *alklaki, montrilo, stirstango.*

NOTU: Mi elektis la formon *musklavo* anstataŭ *musbutono*.

***ne.** [...] **NE-funkcio** KOMP Bulea funkcio de unu argumento, kies rezulto estas 1, se la argumento estas 0. ▷ *negacio.* ⇒ *kombinilo.*

NOTU: Mi sendas al *negacio* pro ĝia senco difinita de la matematikistoj.

***nek.** [...] **(inkluziva) NEK-funkcio** KOMP Bulea funkcio, kies rezulto estas 1, se ĉiu el la argumentoj estas 0. **ekskluziva NEK-funkcio** KOMP Bulea funkcio, kies rezulto estas 1, se para nombro de la argumentoj estas 1. ▷ *AŬ-funkcio.* ⇒ *kombinilo.*

NOTU: *NEK-funkcio* estas *malaŭo* laŭ POK.

nigr/a [...] **∼a skatolo** TEK SCI Aparato, organo aŭ sistemo, kies interna funkciado estas kaŝita de la uzanto aŭ studanto. ▷ *bloko.*

NOTU: En la angla *black box* estas ankaŭ neformala sinonimo de *flight recorder*. Pri tiu senco mi legis strangan aferon en brita ĵurnalaĉo: "... a black box flight recorder is so called – even though it's orange – because the concept of the flight recorder was invented by a man called Professor Gordon Black at Farnborough in 1948." (DAILY EXPRESS Saturday July 27 1996)

***nov/a** [...] **∼aĵgrupo** KOMP Klaso de mesaĝoj en ret∼aĵoj. **∼aĵlegilo** KOMP Programo por konsulti ret∼aĵojn. [...] **ret∼aĵoj** KOMP Publike legeblaj mesaĝoj en komputila reto, klasitaj laŭ diversaj ∼aĵgrupoj, kopiataj inter ∼aĵserviloj k konsultataj per ∼aĵlegilo. ▷ *afiŝo, bultenejo, dissendolisto, TTT.*

numeral/o^Z 1 [...] **2** KOMP Prezentaĵo de nombro per ciferoj k eventuale interpunkcio. ▷ *komo.*

oblikv¹a 1 [...]: *[...]*; *TIP ∼a fasono* (tipara fasono, kies signoj estas klinitaj dekstren, sed havas la saman formon kiel en rekta fasono, male kiel kursivo). [...]

operator/o [...] **2** TEK Homo, kiu funkciigas aparaton, ekz. komputilon (= manipulisto), aŭ faras konektojn en telefoncentralo (= telefonisto).

***ord/o.** [...] **∼i 1** Meti ∼on en ion: *[...]*. **2** MAT Provizi aron per ∼o 5: *∼ita aro*; *∼ita vektora spaco.* [...] **∼igi 1** Fari ion ∼a: *[...]*. **2** KOMP Aranĝi liston laŭ ∼o 5: *alfabete ∼igi nomojn.* [...]

NOTU: La senco de *ordo*, kiun mi aludas per la cifero 5, estas "Rilato en aro, kiu estas refleksiva, malsimetria k transitiva"; verŝajne ĝi estos la lasta senco sub *I*.

NOTU: Senco 1 de *ordi* estas zamenhofa, sed eble oni marku ĝin kiel arkaikan, ĉar ĝin kutime anstataŭas senco 1 de *ordigi*. La distingo inter la duaj, fakaj sencoj de *ordi* kaj *ordigi* estas tamen prudenta.

NOTU: Mi sugestas novan difinon de *ordi* por klarigi, kial ekzistas kaj *ordi* kaj *ordigi*, kvankam la distingo ne vere gravas en la komuna lingvo. Mi pravigas la vortigon de la difino per la zamenhofa citaĵo "la enkonduko de preciza ordo en nian aferon" (lasta alineo de la parolado antaŭ la sepa UK). Tamen mi prenis tiun citaĵon el ne tre fidinda eldono.

organ[1]**o 1** [...] **2** En maŝino, ĉiu ero destinita por plenumi specialan funkcion: *la ∼oj de lokomotivo, de horloĝo*; *reg∼o* (= regilo), *aritmetika ∼o* (= aritmetikilo) *de komputilo.* ▷ *ilo, aparato, instrumento, peco.* [...] **ĉef∼o** KOMP Parto de komputilo, kiu interpretas maŝinlingvajn instrukciojn, prilaboras datenojn k regas la funkciadon. ▷ *procesoro, regilo.*

pane/o [...] **∼i 1** [...] **2** TEK Halti aŭ ĉesi funkcii pro ∼o: *la komputilo ∼is.* ▷ *kolapso.* [...]

***paper/o 1** [...]: *kontinua ∼o* (longa ∼bendo); *[...]*

***par/o.** [...] **∼ecbito** KOMP Kontrolbito, kies valoro estas tia, ke la nombro de bitoj kun la valoro 1 estu ĉiam ne∼a (aŭ ĉiam ∼a).

NOTU: En KBT estas *pareckontrolo* (249).

***paralel/a** [...] **5** KOMP Rilata al datentranssendo, en kiu po pluraj bitoj estas sendataj samtempe laŭ lineo el pluraj dratoj: *∼a interfaco, konekto.* ▷ *seria.* [...] **∼ismo 1** [...] **2** KOMP Metodoj celantaj pligrandigi la komputopovon de komputa sistemo per samtempa plenumado de operacioj. ▷ *ĉenstablo, kunrulo.*

NOTU: Alia komputika senco de *paralela* estas "Rilata al sendependaj procezoj plenumataj samtempe", tamen tiu senco apenaŭ diferencas de la nefakaj sencoj de *paralela* jam menciitaj, ekzemple sub *paralele* en PIV.

parametr/o 1 MAT [...] **2** KOMP Valoro transdonata al proceduro, makroo ks: *formala, fakta ∼o*; *∼opasigo.* ▷ *argumento.*

***part/o** [...] **tempo∼igo** KOMP Reĝimo de komputilo, en kiu la komputilo konstante ŝaltadas sin inter pluraj taskoj kun la efiko, ke ili ŝajnas plenumiĝi samtempe. **tempo∼iga** Aplikanta tempo∼igon, aŭ rilata al tempo∼igo: *tempo∼iga mastruma sistemo.* [...]

NOTU: La vorto *tempopartigo* estas de POK. Ĉe KBT estas *tempodiseriga sistemo* (322). Alia eblo estus *tempodividado.*

NOTU: Eble devus esti *komutadi* anstataŭ *ŝaltadi*, ĉar la eblo ŝalti inter diversaj aferoj ne estas menciita en la artikolo en PIV pri *ŝalti.* Aliflanke tiu artikolo priskribas nur mallarĝan elektroteknikan sencon, kaj mi uzas la vorton pli metafore ĉi tie.

Paskal/o 1 [...] **2** KOMP Programlingvo kreita en 1969 por instrui struktureman programadon.

NOTU: La programlingvo Paskalo estas nomita laŭ Blazio. Ĉu pro tio ĝi rajtas esti en la sama artikolo?

petit/o TIP Tiparo, kies grado estas 8 punktoj: *∼litera teksto.* ▷ *cicero.*

NOTU: Laŭ mi la radiko estas substantiva, kvankam la eblo misanalizi ĝin kiel participon emigas uzi kunmetaĵojn kiel *petitlitera* anstataŭ *petita.*

***pez/i** [...] **∼o** [...] **5** TIP Proporcio inter la larĝo de la plej dikaj strekoj k la larĝo de la blanka interspaco ene de signo: *tipara ∼o.* ▷ *grasa, graseta, kontrasto.* [...]

***pig/o 1** [...] **2** TIP Mezurunuo de longo, uzata en tipografio, egala al 12 ∼aj punktoj (4,2175 mm). ▷ *cicero.* **3** TIP Egallarĝa tiparo kun 10 signoj en colo. [...]

piktogram/o 1 [...] **2** KOMP Vinjeto sur komputila ekrano, kiu simbolas programon aŭ funkcion k ebligas ĝian elekton per montrilo, sen teksta komando. ⇒ *fenestro, muso.*

***plekt/i** [...] **3** TEL Kombini plurajn signalojn por sendi ilin per unu komunika kanalo: *frekvenca ∼ado*; *tempa ∼ado*; *kun∼i signalojn.* [...] **∼ilo** TEL Aparato por ∼i signalojn; = multipleksoro: *signal∼ilo.* [...] **mal∼i 1** [...] **2** TEL Reapartigi ∼itajn signalojn: *mal∼ilo.* [...]

***plen/a** [...] **∼umi** [...]: *[...]*; *komputilo ∼umas programon.*

***pli.** [...] **∼osigno.** La signo >, uzata en matematika neegalaĵo. ▷ *krampo.* **mal∼osigno.** La signo <.

***plum/o** [...] **lum∼o** KOMP **1** Ilo uzata por indiki punkton sur komputila ekrano, funkcianta tiel, ke ĝi detektas la preterpason de la katodradia lumpunkto. **2** Ilo kun la formo de krajono, uzata por legi strekkodojn, funkcianta tiel, ke ĝi mezuras la helecon de la surfaco ĉe sia pinto. [...]

NOTU: Se oni volas, oni povas proponi ankaŭ aliajn formojn: lumgrifelo, lumkrajono, lummarkilo; *lumplumo* estas la formo preferata de POK.

plus. [...] **∼signo.** La signo +. ▷ *signumo.*

***poŝt/o** [...] **ret∼o** KOMP Sistemo por transsendi mesaĝojn inter uzantoj de komputila reto: *ret∼ilo*; *enkursigi ret∼on.* ⇒ *retadreso, retmesaĝo.* **paper∼o** ∼o 2, kontraste kun ret∼o: *paper∼a adreso.*

NOTU: Ekzistas ankaŭ la esprimo *elektronika poŝto*, eble menciinda kiel ekzemplo sub *poŝto.* Ankaŭ *poŝtestro* kaj *poŝtilo* (= retpoŝtilo).

***pra/.** I. Pref., montranta: [...] **3** Originecon: *∼loĝanto, ∼religio, ∼slava lingvo, ∼dosierujo, ∼valoro de variablo.* ▷ *apriora.*

***predikat/o 1** [...] **2** FILO KOMP MAT Eco aŭ karakterizaĵo, kiun oni povas aserti pri iu afero aŭ iuj aferoj: *∼okalkulo.* ▷ *propozicio, kvantizanto.*

NOTU: Mi enmetas, ĉar mi volis mencii predikatokalkulon en la artikolo pri Prologo.

***prepar/i** [...] **5** KOMP Registri sur komputilan diskon la gvidajn markojn k informojn necesajn por ĝia posta uzado kun difinitaj diskaparato k mastruma sistemo; = strukturi: *∼i, re∼i disketon.* ▷ *datenaranĝo.* [...]

***pres/i** (tr). **1** Reprodukti tekston, bildojn ks, ĝenerale en multaj ekzempleroj, k ĝenerale per apliko de inko al papero: *[...].* **3** Fari pozitivan fotografian bildon, ĝenerale sur papero, de negativa bildo sur filmo, aŭ de diapozitivo. **∼ilo** KOMP Eliga aparato de komputilo por ∼i rezultojn surpapere; = printilo: *nadlara, inkŝpruciga, lasera ∼ilo.* ▷ *eltajpilo.* **∼metalo** TIP Alojo el stano, plumbo k antimono uzata por muldi tipojn. **[tele∼ilo.]** [Forigu.]

NOTU: Mi ne vidas bonan motivon por limigi la difinon de *presi* al la metodoj, kiuj ekzistis en la tempo de Zamenhof.

NOTU: La difinoj en PIV de *filmo* kaj *diapozitivo* estas iom frenezaj.

NOTU: Ne gravas, ke oni perdas la telekomunikajn sencojn de *presilo* kaj *telepresilo*; ili estas malaktualaj kaj estas implicitaj de la komputika senco de *presilo*.

print/i (tr). **1** = presi 3. **2** Presi per komputila presilo. **∼ilo** KOMP = presilo. **[∼atoro]** [Ne enmetu.]

NOTU: Senco 2 de *printi* kaj la vorto *printilo* estas iom oftaj, sed ŝajne ekzistas iom da prefero por *presi* kaj *presilo* inter fakuloj. La vorto *printatoro* ne estas uzata kaj ne estas bezonata.

procedur²o 1 [...] **2** KOMP Parto de komputila programo, kiu plenumas apartan taskon k poste redonas la regadon al la ĉefprogramo, kiu vokis ĝin: *rekursa, memvoka ∼o.* ▷ *funkcio.* **pra∼o** KOMP Apriora ∼o.

NOTU: La termino *proceduro* ŝajnas pli bona por ĝenerala uzado ol *subprogramo*, *rutino* aŭ *subrutino*. Eble estus utile en iu speciala kunteksto fari distingon inter kelkaj el ili. Ofte la tradicia terminologio dependas de la programlingvo uzata. KBT preferas ĝeneralan terminon *rutino* (298/302), sed *proceduro* estas preferata ankaŭ de POK.

procesor/o KOMP Parto de komputilo, kiu prilaboras datenojn k ĝenerale ankaŭ interpretas maŝinlingvajn instrukciojn; = datentraktilo, procezilo: *ĉef∼o*; *krom∼o*; *ĉenstabla ∼o.* ▷ *ĉeforgano, aritmetikilo, regilo.* **mikro∼o** Integra cirkvito, kiu enhavas tutan ∼on.

NOTU: Eble la sinonimoj ŝajnas iom tro abundaj, sed estas malfacile fari nun definitivan elekton, kaj eble oni iam faros utilajn distingojn inter ili.

procez/o [...] **∼ilo** KOMP = procesoro.

NOTU: La vorto *procezilo* estas multe uzata, verŝajne pli ol *procesoro*. Ŝajne temas origine pri mistraduko de la angla vorto *processor*, kiu devenas de *process* kun la senco *prilabori*. Tio ne senvalidigas la Esperantan vorton, sed la kunmetaĵo estas stranga en Esperanto, ĉar oni ne uzas la verbon *procezi* (ntr) aŭ eĉ la substantivon *procezo* por priskribi la agadon de procezilo. Vidu ankaŭ la noton sub *ilo*.

NOTU: Eble estus pli bone movi sencon 2 de *procesi* al *procezi*, ĉar *procezi* ŝajnas pli ofta ol *procesi* por tiu senco.

program¹o [...] **2** [...]: *instru∼o*; *stud∼o*. **3** = tagordo. [...] **5** KOMP Koditaj instrukcioj, kiuj komplete difinas la funkciadon de komputilo dum ilia plenumado: *komputila ∼o*; *∼o en C*; *verki, traduki, spuri ∼on*; *munti, lanĉi ∼on*; *komputilo plenumas ∼on*; *uzanto rulas ∼on*; *aplika ∼o* (∼o por rekta uzado de homo); *il∼o* (∼o uzata de alia ∼o aŭ por plenumi bazajn funkciojn; = ilaĵo); *servo∼o* (∼o por fari simplan k ofte bezonatan taskon, ekz. kopii aŭ ordigi dosieron). ▷ *algoritmo, programlingvo, tekstoprilaborilo, tabelkalkulilo, tradukilo.* [...] **∼i** [...] **2** KOMP Provizi komputilon ks per ∼o; verki komputilan ∼on: *∼i vidbendaparaton surbendigi je certa horo.* **∼ado 1** KOMP La verkado k ankaŭ la projektado, provado, dokumentado k vartado de komputilaj ∼oj: *strukturema, modulema, objektema ∼ado.* **2** MAT = matematika ∼ado: *dinamika, diskreta, lineara, nelineara ∼ado.* **∼aro** KOMP Ĉiuj ∼oj uzataj en komputila sistemo. ▷ *aparataro.* [...] **∼isto 1** [...] **2** KOMP Homo, kiu profesie okupiĝas pri ∼ado. **cel∼o** KOMP Komputila ∼o farita per tradukado de font∼o per tradukilo. **font∼o** KOMP Komputila ∼o skribita en fontlingvo k tradukota per tradukilo. **skrib∼o** KOMP = tekstoprilaborilo. **sub∼o** KOMP Memstara parto de ∼o. ▷ *proceduro.* **matematika ∼ado** MAT Metodoj uzataj en operaciesploro por trovi la maksimumon aŭ minimumon de funkcio de pluraj variabloj, kies valorojn limigas kondiĉoj ĝenerale esprimitaj per egalaĵoj aŭ neegalaĵoj. **[mastruma ∼o]** [Ne enmetu.]

NOTU: Senco 3 en PIV de *programo* havas la saman difinon kiel *tagordo*, escepte unu vorton, sed mankas en PIV referenco al tiu pli kutima esprimo.

NOTU: La antaŭa, kibernetika senco de *programo* verŝajne estas implicita kaj inkluzivita de la nova komputika senco.

NOTU: La esprimo *mastruma programo* ne estas uzata; vidu ĉe *mastro*.

Prolog/o KOMP Programlingvo bazita sur predikatokalkulo, aperinta en la 1970-aj jaroj k multe uzata por artefarita intelekto.

[prom/o] [Ne enmetu.]

NOTU: Vidu la komenton ĉe *epromo*.

prompt/a [...] **∼o** Eco de iu, io ∼a. [Ne enmetu sencon 2 de PIVS.]

NOTU: Pli bona termino estas *invitilo*.

propag/i [...] **∼aĵo** KOMP Komputila programo, kiun ĉiu rajtas kopii k disdoni, sed kies uzado estas iel limigita, jure aŭ teknike, ĝis uzanto registras sin k pagas. ▷ *komercaĵo, publikaĵo.*

protokol¹o 1 Oficiala raporto, [...] **2** KOMP Komplika k konvencia procedo por komunikado inter komputiloj. **3** KOMP Aŭtomate farata registro de okazaĵoj en komputila sistemo. [...]

***prunt/e.** [...] **∼o 1** [...] **2** [...] **3** KOMP Negativa transigo dum subtraho. [...]

***publik/o** [...] **∼aĵo** KOMP Komputila programo, kiun ĉiu rajtas senpage kopii k uzi. ▷ *komercaĵo, propagaĵo.* [...]

pund/o [...] Monunuo en kelkaj landoj, i.a. Britujo, simb. £. ▷ *penco, sterlingo.*

NOTU: En la artikolo pri *penco* oni povas mencii, ke iam estis 12 pencoj en ŝilingo.

***punkt/o** [...] **3** TIP Mezurunuo de longo, uzata en tipografio; (cicera) ∼o egalas al 0,3759 mm; en anglalingvaj landoj oni uzas la grandan ∼on (0,3528 mm) k la pigan ∼on (0,3515 mm): *ok∼a tiparo.* ▷ *grado, cicero.* [...] **7** ∼o 1 uzata ĉefe en la angla por apartigi la entjeran k frakcian partojn de nombro, anstataŭ komo. ▷ *decimala.* [...] **sub∼o** TIP Kromsigno kun la formo de ∼o sub litero. **super∼o** TIP Kromsigno kun la formo de ∼o super litero. [...]

NOTU: Senco 1 de *punkto* devus esti almenaŭ du sencoj.

NOTU: Sendu al *demandosigno* kaj *krisigno*, se oni mencias la esprimojn *demanda punkto* kaj *ekkria punkto*.

[ram/o] [Ne enmetu.]

NOTU: La angla akronimo laŭvorte signifas "ajnvice alireblan memoron", tamen preskaŭ ĉia nemeĥanika memorilo estas tia. Oni devas atenti dum tradukado de anglaj ĵargonaĵoj: se la vorto *RAM* estas uzata kontraste kun *ROM*, ĝi signifas "modifeblan kaj maldaŭran" memoron kontraste al "nurlega kaj daŭra", sed ofte ĝi estas uzata tute ne kontraste, kaj la plej bona traduko estas simple *memoro* aŭ *memorilo*.

rastr/o. [...] **∼umi** TEK Skani (surfacon) laŭ paralelaj linioj kun egalaj interspacoj: *∼uma skanado, ekrano, presilo, grafiko, tiparo*; *∼umigilo* (∼uma skanilo). **∼umo** = bitbildo. **∼umero** = bildero.

***redakci/o** [...] **3** Stato de teksto: *ilia definitiva ∼o estos fiksita nur en la kongreso*[Z]; *KOMP la programaro travivis multajn ∼ojn, antaŭ ol publikiĝis la unua eldono*. ⇒ *lego, varianto, eldono*.

NOTU: La vorto *redakcio* (anstataŭ *versio*) estas uzata laŭ POK. Aliajn ekzemplojn trovu en la difinoj de *arkivo* kaj *superskribi*.

redakt[1]i [...] **∼ilo** KOMP Komputila programo por ∼i dosieron, ekz. fontprogramon, komandodosieron, retmesaĝon ks. ▹ *tekstoprilaborilo*.

redund/a. Estanta pluroble aŭ ripete, aŭ aldonita por sekurigi kontraŭ perdiĝo, misfunkcio ks. ▹ *balasto*. **∼o 1** TEL KOMP Uzo de pli da datenoj ol necese por transdoni iun informon, por tiel malpliigi la riskon de eraro en komunikado aŭ komputado. ▹ *kontrolbito*. ⇒ *pleonasmo*. **2** TEK Enesto de pluraj ekzempleroj de parto en elektronika aŭ meĥanika ekipaĵo, por ke la ekipaĵo povu plu funkcii post paneo de parto.

NOTU: La formo redund' estas jam establita en Esperanto, do PIVS malpravas per sia propono redundanc'.

NOTU: PIVS pretendas, ke la vorto havas filologian aŭ lingvistikan sencon kaj donas kiel ekzemplon la akordon de adjektivoj kaj substantivoj. Tamen redundo ne estas multe menciata en konsultlibroj pri moderna lingvoscienco, do verŝajne la ekzemplo en PIVS estas maltipa, do ne tre taŭga por vortaro. Certe la nocio pri redundo estas uzebla en multaj aliaj fakoj ol nur la fakoj menciitaj, sed ne indas aparte dokumenti ĉiun eblon.

NOTU: En la angla la substantivo *redundancy* devenas de adjektivo *redundant*, kies baza senco estas *nebezonata, superflua*. Ŝajnas, ke en Esperanto, same kiel en la germana, oni transprenas nur la teknikajn sencojn. Tio estas evidente ĝusta, ĉar ni ne volas per aldono de teknika termino ŝanĝi tradician, komunlingvan parton de Esperanto, sed ĝi havas la konsekvencon, ke *redundo* estos falsa amiko por anglalingvanoj; la angla vorto *redundant* ĝenerale estu tradukata per: nebezonata, superflua, balasta, tro abunda, superabunda, malkonciza, taŭtologia, seninforma, pleonasma, senlabora, maldungita, ktp, ktp.

NOTU: La vorto *redundo* ŝajnas havi la sencan elastecon, kiu estas tipa pri derivaĵo el adjektiva radiko, do mi difinas la radikon tia.

reel/a [...] **∼o** KOMP ∼a nombro. ▹ *entjero*.

NOTU: Laŭ mia lingvosento temas baze pri substantivo. Certe la vorto *reelo* estas multe uzata de POK kaj aliaj komputikistoj. Christer KISELMAN konsentas, ke *reelo* signifas nombron kaj ne econ laŭ la nuna lingvouzo, sed atentigas pri ebla analogio kun *ebeno*.

referenc[3]o [...] **3** KOMP Dateno aŭ variablo, kies valoro estas la adreso de alia dateno aŭ variablo; = montrilo: *∼o al ∼o al tabelo de signoj*.

***reg/i** [...] **∼ilo** KOMP La parto de komputilo aŭ de ĉeforgano, kiu prenas instrukciojn el la memoro, interpretas ilin k provizas aliajn partojn de la komputilo per la signaloj bezonataj por plenumi ilin. ▹ *aritmetikilo, instrukcinombrilo, organo*. [...]

NOTU: La vorto *regilo* estas en KBT (286). POK preferas la vorton *stirorgano*, sed por mi *stiri* tro forte implicas direktadon de veturilo (kaj efektive ĝi havas tiun signifon laŭ PIV).

***registr/i** [...] **4** Aŭtomate fari daŭran prezentaĵon de pasantaj informoj: *∼i voĉon per fonografo*; *∼i muzikon per sonbendaparato*; *∼anta termometro*; *∼i datenojn, signalon*. ▹ *surbendigi*. **∼o 1** Serio de la enskribitaj notoj, kiun komisiito faris laŭ difinita sistemo pri atestendaj faktoj aŭ aferoj: *[...]*. **2** La sonamplekso de instrumento aŭ voĉo rilate al ĝia pitĉo: *[...]*. **3** KOMP = dateningo. [...] **∼aĵo** Io ∼ita: *konservi ∼aĵojn de ies voĉo, de la temperaturo*. [...]

NOTU: Senco 4 de *registri* jam estis en PIV, sed kun iom malpli ĝenerala difino kaj aliaj ekzemploj; mi ne scias, ĉu ĝi vere meritas la vinjeton TEK. Mi forigis sencon 2 en PIV de *registro*, ĉar laŭ mi oni pli ofte parolas pri *registraĵo* (kiu mankas en PIV), sed mi ne estas certa.

***regul/o** [...] **∼a** [...] **4** KOMP Akceptata de iu finia aŭtomato: *∼a lingvo*; *∼a esprimo*. [...]

reĝim[3]o [...] **3** TEK La kondiĉoj, karakterizantaj la funkciadon de maŝino aŭ aparato aŭ de cirkvito en difinita momento: *majuskla ∼o* (de klavaro); *interaga, taskvica ∼o* (de komputilo); *enŝova, superskriba, linifalda ∼o* (de redaktilo); *grafika ∼o* (de presilo).

NOTU: Mi nur aldonis ekzemplojn al la difino, kiu jam estis en PIV.

NOTU: Bedaŭrinde la PIV-a vorto *reĝimo* ne estas sufiĉe atentita en nacilingva-Esperantaj vortaroj. WELLS tradukas la anglan vorton *mode* en ĝiaj teknikaj sencoj per *modalo*, sed estas senkulpigita de tio, ke lia vortaro aperis en 1969. BENSON ne havas tian senkulpigon por la manko de *reĝimo* en lia artikolo pri *mode* en 1995.

NOTU: La esprimoj *enŝova/superskriba reĝimo* estas *disŝov-reĝimo* kaj *anstataŭiga skribreĝimo* ĉe POK.

***rekt/a** [...] **4** Vertikale staranta: *[...]*; *∼a fasono, tiparo* (kontraste al oblikva aŭ kursiva); [...] **∼igi 1** [...] **2** TIP Aranĝi (tekston) tiel, ke difinitaj partoj estas en vertikaloj: *∼i nombrojn laŭ la komoj*; *∼igi alineon dekstre, maldekstre, ambaŭrande.* ▷ *alkadrigi, centrigi, dekstrigi, maldekstrigi.* [...]

rekursi/o = rekurso.

NOTU: La vorto *rekursio* estas uzata de POK, kiu pravigas ĝin per la argumento, ke ĝi estas "absolute internacia".

***rembur/i** [...] **3** TIP Aldoni spacetojn inter la vortoj de teksto, por ke la linioj havu difinitan longon: *oni preferas ne ∼i la liniojn, se oni uzas egallarĝan tiparon*; *komposti tekston sen∼e.* ▷ *alkadrigi, rektigi.* [...]

***ret/o** [...] **5** Sistemo de konektoj aŭ komunikiloj: *fervoja, ŝosea, kanala, telefona, komputila ∼o*; *∼o de akvoduktoj.* [...] **Inter∼o** KOMP Tutmonda komputila ∼o: *nova apliko de Inter∼o.* [...]

rezid/i [...] **∼a** KOMP (pp komputila programo) Restanta konstante en la ĉefmemoro: *munti ∼an programon.*

rikord/o = datenopo.

rikur/a MAT (pp funkcio de N al N) Tia, ke oni povas kalkuli ĝiajn valorojn ĉe argumento n uzante nur la valorojn ĉe 0, 1, ..., $n-1$ k certajn simplajn regulojn: *laŭ la tezo de Church ĉiu efike kalkulebla funkcio estas ĝenerale ∼a* (komputebla); *primitive ∼a.* ▷ *rekursa.*

NOTU: Ĉi tio estas la difino de la matematikistoj kun tri aldonoj: la parenteza mencio de *komputebla*, la ekzemplo "primitive rekura", kaj la referenco al *rekursa.*

***ring/o** [...] **4** TIP Supersigno (o) kun la formo de malgranda rondo, uzata super vokaloj i.a. en la lingvoj ĉeĥa, dana k sveda. [...]

NOTU: Montru la ĝustan signon anstataŭ *o*. En la dana kaj la sveda temas pri la litero å; en la ĉeĥa la supersigno aperas super U. Laŭdire la japanaj kanaoj havas similan kromsigno-ringon.

Rom/o [...] **∼a.** Rilata al ∼o: *[...]*; *∼aj ciferoj* (I, V, X, L, C, D, M, kontraste al la eŭropaj); *TIP ∼a fasono, tiparo* (klasika aŭ rekta). [...]

NOTU: Kiel POK, mi preferas forigi la sufikson -an' el la PIV-aj *romanaj ciferoj* kaj *romanaj tipoj*; ĝi estas nacilingva adjektiva finaĵo! POK konsideras la terminon *roma* evitinda en tipografio; prefere oni uzu la adjektivon *klasika* aŭ *rekta*, depende de la senco.

NOTU: Ne enmetu la neologismon *romo* el PIVS. Temas pri *neŝanĝebla memoro* aŭ *nurlega memoro*. Ne necesas inventi akronimon en Esperanto, nur ĉar la angla uzas akronimon.

***romp/i** [...] **inter∼o 1** [...] **2** KOMP Signalo al la regilo de komputilo, kaŭzanta salton al difinita adreso anstataŭ plenumado de la sekva instrukcio: *malŝalti inter∼ojn*; *inter∼otraktilo.* ▷ *bremso.*

***rond/o** [...] **∼igi 1** Fari ion ∼a: *la ondoj de la maro iom post iom ∼igas la angulecan pecon da roko*^{Z}; *∼igi siajn frazojn.* **2** KOMP Anstataŭigi neprezenteblan nombron per proksima prezentebla nombro: *∼igi la rezulton ĝis la plej proksima entjero*; *∼igeraro.* [...]

***rul/i** [...] **4** KOMP Plenumigi komputilan programon: *uzanto ∼as programon en komputilo per la mastrumilo*; *la kapablo de programo ∼iĝi per diversaj komputiloj*; *∼tempa eraro.* ▷ *lanĉi, munti.* [...] **∼umi** (tr). **1** Volvi 1. **2** Volvi skrib∼aĵon de unu bastono al alia por legi ĝin. **3** KOMP Movi (tekston) sur komputila ekrano por rigardi tekston, kiu estas tro granda por la ekrano aŭ por la fenestro: *∼umi tra longa dosiero.* ▷ *foliumi.* [...] **kun∼o** KOMP Samtempa plenumo de pluraj programoj per la samaj komputaj rimedoj: *kun∼aj algoritmoj.* ▷ *tempopartigo, paralelismo.* [...]

NOTU: Kiel klarigite en la artikolo pri *programo*, uzanto rulas programon, kaj komputilo plenumas ĝin. Por normala uzanto sufiĉas simple *lanĉi* programon, aŭ *munti* ĝin, se ĝi estas rezida, sed la komputika senco de *ruli* estas utila en iuj fakaj esprimoj.

***salt/i** [...] **∼o** [...] **3** KOMP En komputila programo, instrukcio indikanta lokon, de kiu la plenumado plu iros: *kondiĉa ∼o*; *∼marko* (simbolo montranta lokon, al kiu ∼o povas referenci); *oni evitas ∼ojn en strukturema programado.* [...]

***salut/i** [...] **4** KOMP Komenci seancon kun komputilo, anoncante sin k pruvante sian identecon per siaj nomo k pasvorto. ▷ *adiaŭi.* [...]

seanc/o [...] **5** KOMP La tempo, dum kiu komputilo akceptas komandojn de iu uzanto, de la saluto ĝis la adiaŭo.

NOTU: La vorto estas uzita de POK kaj almenaŭ unufoje en Monato.

***serĉ/i** [...] **duoniga ∼o, dupartiga ∼o** KOMP ∼o, en kiu oni ripete dividas regionon k demandas, en kiu parto estas la solvo. **elĉerpa ∼o** KOMP Metodo solvi problemon per laŭvica provado de ĉiuj ebloj. ▷ *respurado.* [...] **erar∼ilo** KOMP = spurilo.

NOTU: Mi ne scias, ĉu mia traktado de plurvortaj kapvortoj estas laŭregula. (Cetere, la kapvorto *ripete* mankas en PIV.)

***seri/o** [...] **∼a 1** [...] **2** KOMP Rilata al datentranssendo, en kiu la bitoj de dateno estas sendataj unu post alia: *∼a interfaco, konekto.* ▷ *paralela.*

serif/o TIP Transversa streketo ĉe la fino de ĉefa streko en presita signo; = literkalkano: *en presita teksto oni ĝenerale uzas ∼ajn literojn, sed sen∼aj literoj estas kutimaj en titoloj k afiŝoj.* ▷ *klasika.*

NOTU: La vorto *serifo* estas jam uzita, ekzemple en Monato. WELLS tradukas la anglan vorton *serif* per *(liter)streketo*, kaj *sanserif* per *senstreketa* aŭ *senornama*. Ĉe BENSON estas *literstreketo* aŭ *ornamstreketo*, kaj *senornama*. La kunmetaĵo *literkalkano* estas proponita de POK, kiu pruntis ĝin el la ĉeĥa. France oni diras *empattement*, t.e. *enkruraĵo*.

***serv/i** [...] **∼ilo** KOMP Komputilo, kiu plenumas iujn funkciojn laŭ mendoj de aliaj komputiloj en komputila reto: *dosier∼ilo*; *novaĵ∼ilo*; *TTT-∼ilo.* [...]

[set/i] [Ne enmetu.]

NOTU: Temas pri *ŝargi, elekti* aŭ *agordi*.

***sign/o 1** Io sensebla, per kio oni povas rekoni, supozi, diveni aŭ antaŭvidi ion, kio mem ne estas senpere sensebla: *[...].* ▷ *atesto, indiko, pruvo, signalo, simptomo, spuro.* **2** Natura aŭ konvencia movo aŭ gesto, uzata anstataŭ vortoj, por transdoni informon, ordonon ks: *[...].* ▷ *signalo.* **3** Konvencia, plej ofte skriba prezento, desegno, streko, bildo ks, kun difinita signifo: *[...]*; *interpunkciaj ∼oj*; *askiaj ∼oj*; *videbla, nevidebla ∼o en datena transsendo.* ▹ *litero, cifero, marko, simbolo.* **4** Simbolo 1: *[...]*; *elcento∼o* (%), *egalo∼o* (=), *plio∼o* (>). **5** Signalo 1: [...] **∼aro 1** Aro da ∼oj: *[...]*. **2** KOMP Aro de ∼oj 3 identigeblaj per numeroj, ĝenerale laŭ iu normo: *la ∼o ĉ havas la koderon 230 en la ∼aro ISO 8859-3*; *fiks∼ara vidigilo* (kontraste al grafika). ▹ *alfabeto, kodo, tiparo, Askio, Unikodo.* [...] **∼umo** MAT (pp reela nombro) +1, se la nombro estas pozitiva, −1, se ĝi estas negativa, k 0, se ĝi estas nula. [...] **eskap∼o** KOMP ∼o, kiu indikas specialan interpreton de la tuj sekvontaj ∼oj. [...] **krom∼o** TIP Malgranda ∼o, aldonita al litero aŭ al noto, por marki ian modifon de sono: *krom∼o povas esti super∼o, tra∼o aŭ sub∼o*; *krom∼itaj literoj*; *la E-aj krom∼oj estas nur du: la cirkumflekso k la hoketo*; *muzikaj krom∼oj dieso k bemolo.* ▹ *supersigno, subhoko, trastreko, subpunkto.* [...] **super∼o.** Krom∼o super litero: *skribmaŝino sen aŭtentaj super∼oj.* ▹ *agrafo, cirkumflekso, hoketo, korno, ringo, tildo, tremao, superpunkto, superstreko.* [...] **∼obildo** TIP La grafika aspekto de ∼o aŭ grupo de ∼oj: *la ∼obildoj de tiparo.* ▹ *tipo, ligaĵo.* [...] **ondo∼o** TIP Tipografia ∼o (∼) kun la formo de onda linieto; = ondostreko. ▹ *tildo.* [...] **pres∼aro** = tiparo. [...] **stir∼o, rego∼o** KOMP ∼o, kiu ne havas propran ∼obildon, uzata en datena transsendo por movi la tajpmontrilon, ŝanĝi la reĝimon, ks: *grava stir∼o estas linifino.* [...] **tajp∼o** = tajpmontrilo. [...]

NOTU: Mi decidis reverketi la PIV-an artikolon pri *signo*: Senco 1 en PIV de *signo* ŝajnas preskaŭ arkaika: kvankam ĝi plu vivas en konataj citaĵoj, ekzemple "Sub la sankta signo de l' Espero", mi apenaŭ povis trovi modernajn ekzemplojn de ĉi tiu senco. Do verŝajne ĝi ne estu la unua senco laŭvice. Cetere, la zamenhofa ekzemplo "li faris la signon de kruco" povus same bone aparteni al senco 3 de PIV. Do mi movis sencon 1 al la fino (novaj sencoj 4 kaj 5).

NOTU: Mia senco 3 kovras la tipografian kaj komputikan sencojn, sed ĝi estas ankaŭ komunlingva, do ĝi verŝajne ne bezonas vinjetojn.

NOTU: La difino de *signumo* estas de la matematistoj, kun unu korekto: por konformigi la difinon al la stilo de PIV mi anstataŭigis la nedifinitan verbon *nulas* per *estas nula*. Laŭ mia lingvosento *nuli* estas (pseŭdo)poezia vorto kaj ne apartenas al la normala lingvo.

NOTU: La vorto *legosigno* verŝajne estu difinita en la artikolo pri *signo* anstataŭ ĉe *legi*; ĝi ŝajnas havi la saman signifon kiel *paĝosigno*.

NOTU: La zamenhofa ekzemplo post *supersigno* bedaŭrinde ne montras la vorton *supersigno*!

NOTU: La vorto *supersigno* estas komunlingva, dum la vorto *kromsigno* estas iom faka, do ofte oni aŭdas la vorton *supersigno* uzata pri kromsignoj ĝenerale, ekz. "la supersignoj en la franca" (inkluzive de subhoko). Tio estas iom natura afero, ĉar la plej multaj kromsignoj estas supersignoj, kaj en Esperanto estas nur supersignoj.

NOTU: Oni povus aldoni referencon de *alfabeto* al *signaro.*

***signal/o** [...] **4** ELE Ŝanĝoj farataj en la valoro de elektra tensio ks, ĝenerale por transsendi informojn en elektronika cirkvito aŭ telekomunikado. ▹ *bruo.* [...]

NOTU: Mi rapide difinas ĉi tiun sencon de *signalo*, ĉar mi bezonas ĝin.

simbol[1]o 1 Io, kio prezentas, elvokas aŭ servas por esprimi ion alian, pro analogio aŭ pro konvencio, precipe io konkreta, kiu anstataŭas ion abstraktan: *blanko estas ∼o de pureco*; *verda stelo estas ∼o de Esperanto*; *ne ĉiuj popoloj vidas en la kiso ∼on de amo*[Z]; *la esperantismo, kies natura ∼o mi estas*[Z]; *papilioj estas rigardataj kiel ∼oj por nedifektita mondo*; *naciaj ∼oj.* ▹ *atribuo, emblemo, signo.* **2** Litero aŭ alia signo aŭ grupo de signoj uzata en matematiko, scienco, muziko ktp por prezenti objekton, kvanton, rilaton, operacion ktp: *Pb estas la ∼o de plumbo*; *fonetikaj ∼oj*; *integral∼o.* **3** [...] **∼a 1** Rilata al ∼oj aŭ konsistanta el ∼oj: *∼a skribado* (el naturaj figuroj); *la ∼a lingvo de la songoj.* **2** Servanta kiel ∼o: *mitaj, ∼aj personoj*; (*la ĥina skribo*), *en kiu per unu komuna ∼a signo estas esprimata tiu sama penso*[Z]. **3** Havanta valoron nur de ∼o, ne de realaĵo: *tio estis nur ∼a ofero*; *∼aj strikoj, punoj.* **∼i** (tr). Esti ∼o de: + *∼as adicion*; *oni interplektas la manojn, por ∼i harmonion.* **∼aro.** Tuto de la ∼oj uzataj en iu fako: *la tradicia matematika ∼aro*; *la kemia ∼aro.* ▹ *notacio.* **∼igi.** Prezenti per ∼o: *helenoj ∼igis la pacon per la olivarbo.* **∼iko**[Z]**.** [...] **∼ismo** [...] **∼isto.** [...] **operaci∼o** KOMP ∼o uzata en programlingvo por indiki operacion: *la operaci∼oj * k / ligas pli forte ol + k -.* **vort∼o** KOMP Signoĉeno uzata en komputila programo, kiel parto de la lingvo aŭ kiel nomo de variablo, proceduro ks: *rezervita vort∼o.*

NOTU: Mi proponas revizion de preskaŭ la tuta artikolo pri *simbolo*, kvankam ne vere necesas. Laŭ mi la Rimarko estas balasto, kaj la 3-a senco en PIV de *simbolo* estas multe pli grava ol la 2-a senco. Cetere, indas aldoni referencon de *notacio* al *simbolaro.*

simul/i 1 [...] **2** SCI KOMP Imiti la kondiĉojn, ĉe kiuj okazas iu fenomeno, por esplori ĝin aŭ por trejnado: *∼i senpezecon per ekzercado subakve*; *∼i per komputilo la formiĝon de stelo.* ▹ *eksperimenti, modeli.* **∼ado** Ago de iu, io ∼anta: *∼ado de frenezo*; *∼ado de ekonomiaj movadoj.* **∼ilo** Aparato por ∼i: *flug∼ilo.* ▹ *imitilo.*

***sistem/o** [...] **[operacia ∼o]** [Ne enmetu.] **[funkciad-∼o]** [Ne enmetu.]

NOTU: Aldonu referencon al *bloko*, supozeble en senco 4 de *sistemo.*

NOTU: La esprimoj *operacia sistemo* kaj *funkciadsistemo* ne estas uzataj; vidu ĉe *mastro.*

skan/i (tr) TEK Sisteme k tute ekzameni: *∼i per elektrona radiofasko* (en televida kamerao); *∼i la ĉirkaŭaĵon per radaro, per eĥosondilo*; *∼i pacienton per ∼ografo*; *∼i foton* (por enkomputiligi ĝin); *∼i radiofrekvencojn, spektron.* ▹ *rastrumi.* **∼ografo** Aparato, ofte uzata medicine, kiu kreas bildon de la interno de io per komputila traktado de la informoj ricevitaj ∼ante ĝin per rentgenradioj, ultrasono ks. ▷ *radiografi.* **∼ografio** La tekniko, per kiu funkcias ∼ografo. **∼ilo 1** Aparato por ∼i. **2** KOMP Bildbitigilo.

NOTU: Mi sentis neceson reverki la difinon en PIVS, kiu havas plurajn mankojn: (1) La vorto *perpendikle* ne estas registrita. (2) La uzado de *jen ... jen ... jen ...* estas malĝusta, ĉar ne temas pri alterniĝo. (3) La difino ne allasas skanadon de frekvencoj. (4) Mankas la indiko TEK. (5) Mankas ekzemploj de la uzado de *skani.* (6) La baza signifo de *skani* estas "sisteme ekzameni", sed nek la vorto *sisteme* nek iu sinonimo de ĝi estas menciita. (6) La priskribo de *skanografio* ne estas komprenebla. (7) La baza celo de skanografio – fari bildojn – ne aperas sufiĉe frue en la difino. (8) Mankas eksplicita mencio, ke per skanografio oni faras bildojn de internaj organoj; tio estas menciinda pli klare ol nur per referenco al *radiografio.*

skem^{4}o. [...] **flu∼o** Grafikaĵo, kiu prezentas sinsekvon de procedoj per vortoj k interkonektantaj sagoj, ekz. por montri kiel funkcias algoritmo, aŭ kiel oni riparu aparaton. ▷ *instrukcio.*

NOTU: PIVS donas la difinon "Detala grafika figuro de ĉiuj vojoj, kiuj eblas ĉe programiro", sed temas pri pli ĝenerala, ne nur komputika nocio, laŭ mi. Se temus nur pri komputilaj programoj, oni povus uzi la esprimon *programskemo* el KBT (276).

***skrib/i** [...] **7** KOMP Meti datenojn en memoron: *∼i datenojn sur diskon.* ▷ *legi, registri, ŝargi.* [...] **∼maŝino** = tajpilo. [...] **super∼i** (tr) **1** ∼i vorton super alia vorto, kiun oni volas ŝanĝi: *en la librotenado estas malpermesite super∼i literojn aŭ ciferojn.* **2** KOMP ∼i datenon en memoron, tiel detruante la datenon, kiu estis tie antaŭe: *super∼i la malnovan redakcion.* [...]

NOTU: Eble oni movu la subartikolon pri *skribmaŝino* al la artikolo pri *maŝino.*

softvar/o (evi) = programaro.

***spac/o** [...] **∼eto** TIP Blanko inter tajpitaj aŭ presitaj vortoj, aŭ signo, kiu prezentas tian blankon: *nerompebla ∼eto*; *antaŭira, vosta ∼eto.* [...]

split^{3}o [...] **3** TEK La peceto de duonkonduktanta kristalo, sur kiu integra cirkvito estas konstruita. ▷ *ico, blato.*

NOTU: Mi neniam renkontis la PIV-an vorton *harsplitado.* Ĉu ne estus pli saĝe simple sendi al la kutima kaj ĉiutaga esprimo *harfendado*?

spur/o [...] **∼i** (tr) **1** [...] **2** KOMP Sekvi la plenumadon de komputila programo paŝo post paŝo por trovi misfunkcion: *∼ilo.* [...] **re∼ado** KOMP Serĉmetodo, laŭ kiu oni elektas valorojn por kompletigi solvon, ĝis ne plu eblas daŭrigi, k tiam reiras al la punkto de la lasta elekto (re∼ante sian vojon) k provas novan elekton. ▷ *nedeterminisma, elĉerpa serĉo.*

NOTU: En KBT estas *postirilo* (250), sed aliaj aŭtoroj uzas la verbon *spuri.*

NOTU: Anstataŭ *respurado* ĉe POK estas *malavanco* ("metodo de provoj kaj malavancoj").

***stabl/o** [...] **ĉen∼o 1** [...] **2** KOMP Vico de samtempe funkciantaj organoj, kiuj plenumas po unu parton de kompleksa operacio, transdonante la rezultojn laŭ la vico. ▷ *paralelismo.* [...]

stak/o [...] **3** KOMP Datenstrukturo konsistanta el vico de elementoj kun varia longo k kun la bazaj operacioj aldoni elementon ĉe la supro k forpreni la supran elementon: *sur∼igi, el∼igi datenon*; *plenum∼o* (por teni lokajn variablojn k la revenadreson dum plenumado de proceduro); *oni povas realigi ∼on per listo aŭ per tabelo.* [...]

***stang/o.** [...] **stir∼o 1** [...] **2** KOMP Eniga aparato por komputiloj kun la formo de movebla ∼eto, uzata ĉefe por ludoj. ▷ *muso.* [...]

stapl/o^Z 1 [...] **2** KOMP Memorilo, kiu staras inter procesoro k pli granda, sed malpli rapida memorilo k tenas la plej ofte aliratajn datenojn por tiel ŝpari alirojn al la malpli rapida memorilo: *∼o funkcias kiel bufro inter la ĉefmemoro k la procesoro.*

NOTU: La esprimo *staplo* estas de Jelenc; POK preferas la esprimon *kaŝmemoro.*

***stel/o** [...] **∼eto** TIP = asterisko.

stokast/a [...] **∼o, ∼a variablo.** Variablo, kiu havas akumulan probablodistribuon. [...] **kvazaŭ∼o** KOMP Unu el serio da nombroj kalkulitaj per formulo k uzataj kvazaŭ ∼o en simulado aŭ alia komputado: *kvazaŭ∼a funkcio.* [...]

NOTU: Mi ne kapablas juĝi, ĉu la baza difino de stokast' estas bona, sed mi esperas, ke mi rajtas aldoni la vorton *stokasto* kun la sama senco kiel *stokasta variablo.*

NOTU: Devus esti ia ĉeno de referencoj inter *hazarda* kaj *stokasta*, por ke diligenta uzanto de la vortaro povu trovi unu, komencinte ĉe la alia.

NOTU: Ĉe KBT estas *hazardnombra generatoro* (114), kaj ĉe POK estas *stokastogenerilo*, tamen laŭ PIV *generatoro* estas maŝino por produkti elektron, kaj *generilo* estas seksorgano!

stor/o (evi) = memorilo.

***strek/i** [...] **super∼o** TIP Kromsigno kun la formo de horizontala ∼o super litero, por montri longecon de vokalo aŭ tonon. **tra∼o** TIP Kromsigno kun la formo de ∼o farita tra litero, ekz. en pola l, dana o, kroata d aŭ malta h. **divid∼o** TIP Skriba k tipografia signo (-), uzata i.a. por dividi la elementojn de aparte longa aŭ nekutima kunmetita vorto, aŭ por transporti parton de vorto sur la sekvan linion. **halto∼o** TIP Skriba k tipografia signo (–), uzata i.a. por signi dialogon, aŭ por apartigi frazpartojn pli forte ol per komo. ▷ *minussigno, citilo.* [...] **ondo∼o** TIP = ondosigno. [...] **supren∼o** TIP La signo /, uzata por fari frakcion aŭ apartigi alternativojn. **malsupren∼o** TIP La signo \\. [...]

NOTU: Se ne eblas komposti la polan, danan, kroatan kaj maltan literojn, revortumu.

NOTU: Minussigno kaj haltostreko estas apartaj signoj; kelkfoje ili eĉ aspektas malsame.

NOTU: Ekzistas amaso da aliaj eblaj nomoj por (mal)suprenstreko: dividosigno, divido, oblikvo, oblikva frakcistreko, dekstren klinita streko; maloblikvo, inversa frakcistreko, retroklino.

NOTU: Mi kontraŭ-PIV-e aplikis la vorton *alternativo*!

struktur/o [...] **~i** (tr). **1** [...] **2** KOMP = prepari 5. [...]

NOTU: Paul PEERAERTS uzas la esprimon esprimon *strukturi diskon*. Verŝajne eblus paroli ankaŭ pri disko kun *DOS-strukturo*, kun *Mac-strukturo*.

***sub.** [...] **de~a.** Komenciĝanta ĉe la ~o: *de~a konstruado*; *enkonduki E-on laŭgrade k de~e*; *desupremaj k de~emaj agantoj.* ▷ *desupra.*

NOTU: La ekzemplo kun *desupremaj* estas el la Manifesto de Raŭmo.

[substrat/o] [Ne enmetu sencon 4 de PIVS.]

NOTU: Senco 1 en PIV jam sufiĉas rilate la fabrikadon de integraj cirkvitoj, kvankam mi forte rekomendas uzi pli klaran esprimon kiel *subtavolo* aŭ *apogtavolo* anstataŭ *substrato*. La difino en PIVS povas esti malĝusta, ĉar la simila vorto en aliaj lingvoj ofte signifas la duonkonduktantan kristalon mem, dum la difino en PIVS ŝajne aludas ion nekonduktantan sub tio. Cetere, PIVS havas la malĝustan fakindikon.

***sum/o** [...] **~ilo** KOMP Cirkvito por kalkuli la ~on de du nombroj: *paralela, seria ~ilo.* ▷ *aritmetikilo.*

***supr/e.** [...] **de~a.** Venanta de la ~o aŭ komenciĝanta ĉe la ~o: *de~a direktivo*; *de~a projektado*; *klopodoj devigi la uzon de E-o de~e*; *de~ismo.* ▷ *desuba.* [...]

NOTU: La ekzemplo kun *desupre* estas el la Manifesto de Raŭmo.

***ŝarg/i** [...] **4** KOMP Provizi dateningon aŭ variablon per valoro, aŭ provizi memorilon per datenoj: *~i la adresingon A2 per la adreso de la komenco de la ĉeno*; *~i N per la longo de la enigaĵo*; *pra~i variablon* (doni al ĝi ĝian komencan valoron); *re~i post kolapso de la programaro*; *bind~ilo* (programo por bindi programon k ~i la memoron per ĝi). ▷ *atribuo, legi, skribi, munti.* [...]

***ŝlos/i** [...] **~ilo 1** [...] **2** Parametro de ĉifrado, determinanta unu el la eblaj varioj de la ĉifro: *ĉifro~ilo*; *ĉifrado per publika ~ilo.* [...]

NOTU: Forigu la ekzemplon "ŝlosilo de kriptogramo".

***ŝov/i** [...] **~o 1** [...] **2** KOMP Operacio, en kiu oni movas ĉiujn bitojn de komputila vorto dekstren aŭ maldekstren: *aritmetika, logika, cikla ~o.* [...] **de~i 1** [...] **2** TIP Aranĝi parton de teksto en alia distanco de la marĝeno ol la cetera teksto: *de~i la unuan linion de alineo.* ▷ *krommarĝeno, alineo.* [...] **en~i 1** [...] **2** [...]; *en~i vorton, alineon en tekston.* [...]

NOTU: En Monato mi renkontis la vorton *ensalto* kun la senco de *deŝovo*, sed ĝi estus malpli utila kiel verbo. Verŝajne la ĉefa kaj unua senco de *alineo* estu nun ĝia dua senco en PIV (peco de teksto).

***ŝut/i** [...] **3** KOMP Transsendi datenojn amase: *el~i programon, tiparon, novaĵojn* (de servilo al uzanto); *al~i dosieron* (al servilo). [...]

***tabel/o** [...] **5** KOMP Datenstrukturo konsistanta el aro da samspecaj elementoj, kiujn oni referencas per indicoj, ĝenerale entjeroj en iu intervalo; la nombro de indicoj estas la nombro de dimensioj de la ~o: *unudimensia, tridimensia ~o el reeloj.* ▷ *matrico, vico.* [...] **ver~o** ELE KOMP ~o, kiu montras la eligaĵojn de cifereca cirkvito por ĉiu kombinaĵo de la enigaĵoj. ▷ *bulea, kombinilo.*

NOTU: La termino *tabelo* estas uzata i.a. de POK; mi ne mencias la multajn aliajn proponojn, kiuj inkluzivas: datena vico, vicaro, latiso.

NOTU: Oni uzas valortabelojn ankaŭ por filozofia kaj matematika logiko, do eble necesos aldoni alian sencon (kiu tiam estu la unua senco pro la historio kaj la etimologio).

tajp/i [...] **~eca** Kun la aspekto de ~aĵo: *~eca fasono, tiparo* (karakterizita de egallarĝaj signoj kun grandaj serifoj). **~ilo.** Aparato por ~i; = skribmaŝino: *meĥanika, elektra ~ilo.* ▷ *klavaro.* ⇒ *inkrubando.* **~isto.** Homo, kies metio estas ~ado, ĝenerale de tekstoj diktitaj surkasede. ▷ *sekretario.* **el~ilo** KOMP Presilo uzata nur por teksto. **tele~i** (tr). Sendi per tele~ilo: *tele~i la kurzojn de borso.* **tele~ilo 1** Aparato, kiu skribas tekston laŭ telegrafia signalo. **2** Simila aparato ekipita ankaŭ per klavaro k antaŭe uzata por komunikado inter homoj aŭ inter homo k komputilo. ▷ *telekso, terminalo.*

takt^{1}o [...] **4** ELE Signalo konsistanta el regula sinsekvo de impulsoj k uzata por samtempigi la operaciojn en cifereca cirkvito: *la ~ofrekvenco de komputilo.* ▷ *pulso.* **5** (f) Kapablo sagace juĝi [...] **~ilo** ELE Cirkvito, kiu produktas ~on 4. [...]

task^{1}o [...] **3** KOMP Programo aŭ parto de programo, kiu plenumiĝas sendepende, kun propraj rimedoj k aparte administrata de la mastruma sistemo: *~vica komputado*; *plur~a sistemo*; *ŝanĝi la prioritaton de ~o*; *disponigi rimedojn al ~o*; *fona ~o.* ▷ *kunrulo.* [...]

***tekst/o** [...] **[~o-prilabora programo]** [Ne enmetu.] **~oprilaborilo, ~ilo, ~programo** KOMP Komputila programo por redakti ~on k pretigi ĝin por presado, elektante, kiel ĝi aspektu sur la papero; = skribprogramo. ▷ *redaktilo, kompostilo, enpaĝigi, tipografio.* [...] **hiper~o** KOMP Komputila ~o, eventuale ankaŭ kun bildoj k sonoj, provizita per referencoj aŭ ligoj, kiujn uzanto povas laŭvole sekvi por trovi deziratajn informojn. ▷ *TTT.* **kun~o.** [...]: *[...]*; *senkun~a gramatiko, lingvo.* [...]

NOTU: Kiam oni diskutis en SCE pri eblaj nomoj de *tekstoprilaborilo* kaj *redaktilo*, venis amaso da diversaj proponoj; certe ne eblus mencii ĉiujn. La vorto *tekstoprilaborilo* estas iomete establita: Ĉapelilo estas *tekstoprilaborilo* laŭ siaj reklamoj (ankaŭ mencio en *Esperanto*, 1996, p. 114). La formoj *tekstilo* kaj *tekstprogramo* estas proponoj, kiuj eble akceptiĝos; ili havas la avantaĝon esti malpli longaj. La propono *skribprogramo* estas sugestita de la germana vorto *Schreibprogramm*. Alia propono estas *verkilo*.

NOTU: De la artikolo pri *komposti* estu referenco al *enpaĝigi*, kaj de *kompostilo* al *tekstoprilaborilo*.

NOTU: Pripensindaj estas esprimoj kiel *surtabla tipografio*, *tekstaranĝilo*, ks.

teleks/o TEL Speco de telegrafo konsistanta el teletajpilo konektita al speciala reto: *anstataŭi la nunajn telefonan, ~an k aliajn retojn.* ▷ *faksilo, retpoŝto.* **~i** (tr). Sendi per ~o.

NOTU: PIVS difinas nur la verbon *teleksi*, sed laŭ mi la baza formo estas *telekso*, analogie kun *telefono* kaj *telegrafo*. Jenaj citaĵoj el *Manlibro pri Ĵurnalismo* subtenas tiun analogion: "Tio okazas (teknike) per la plej diversaj rimedoj: telefono, telegramo, telekso kaj telefon-kopiilo. En la centralo oni redaktas la alvenintajn raportojn (se necese, tradukas) kaj elsendas ilin per telekso al la klientoj (abonantoj)." (p. 9) "Informo sendita per telekso de la inform-agentejo Associated Press (AP) en germana lingvo." (p. 13)

NOTU: Ĉi tiu komunikilo estas jam eksmoda; UEA forĵetis sian post la UK en Kubo.

telematik/o TEL Komputiko aplikata al telekomunikado.

***temp/o** [...] **real~a** KOMP Rilata al komputa sistemo, kiu reagas sufiĉe rapide al ŝanĝiĝantaj datenoj por influi la eksteran procezon, de kiu ili venas: *real~a simulado*; *real~a forumo en komputila reto.* ▷ *interaga, tuja, tempopartiga, taskvica.* [...]

tera/. Pref. kun la signifo de biliono (10^{12}), simb. T: *~metro* (Tm). ▷ *giga/.*

NOTU: Ankoraŭ ne uzata pri komputila memorilo. Eble post kelkaj jaroj!

terminal/o KOMP Vidigilo ekipita per klavaro, aŭ simila aparato, per kiu uzanto komunikas kun komputilo, ofte de alia loko. ▷ *teletajpilo.*

NOTU: Apud *terminalo* PIVS donis ankaŭ la proponojn *fin-aparato* kaj *fin-modjulo*, kaj KBT havas la terminon *datena fininstalaĵo* (76), sed tiuj esprimoj ne estas uzataj. Por eviti la neologismon *terminalo* verŝajne necesus trovi alian vojon ol kopii ĝian etimologion. Ekzemple, en la germana estas *Daten(sicht)station* (daten(vid)stacio). Oni povus subkompreni la klavaron kiel parton de la *vidigilo*, kaj mi verkis la difinon por iomete sugesti tiun eblon.

tild/o TIP Supersigno (˜), uzata i.a. super n en la hispana (por doni sonon similan al nj) k super vokaloj en la portugala (por ilin nazaligi). ▷ *ondosigno.*

NOTU: En PIV estas montrata io pli simila al ondosigno ol al tildo; atentu pri tio.

tip¹o [...] **3** TIP Peco de metalo kun reliefa bildo de litero aŭ alia signo, uzata por presado, aŭ muldilo por fari tian pecon: *ĉar tiuj ĉi literoj estas uzataj tre malofte, tial neniu presito volos prepari por ili apartajn ~ojn*^{Z}. ▷ *frakturo, gotika, cicero, petito.* **4** TIP KOMP Datenoj, kiuj difinas la grafikan aspekton de litero aŭ alia signo, ĝenerale per bitbildo, matematikaj formuloj, aŭ komputila programeto. [Movu 4 k 5 al 5 k 6.] [...] **~aro** TIP KOMP Aro de ~oj, ĝenerale la literoj de iu alfabeto plus ciferoj k aliaj signoj, ĝenerale indeksitaj per la nomoj aŭ la koderoj de la signoj: *proporcia, egallarĝa ~aro*; *ekrana, presila ~aro*; *elekti alian ~aron por la piednotoj.* ▷ *fasono, familio, grado, kontrasto, pezo.* [...] **pres~o** = tipo 3, 4.

NOTU: La PIV-a difino de senco 3 estas kritikinda pro la nedifinita kunmetaĵo *preslitero* kaj la mencio de malesenca *noĉo*.

NOTU: Oni povas forigi la difinon de *tiparo*, kiu jam estas en PIV, ĉar laŭ la kutimaj leksikografiaj kriterioj de ofteco kaj malreguleco ĝi ne estas menciinda.

totalizator/o [...]

NOTU: Forigu la unuan sencon ("Meĥanika sumigilo"). Ankaŭ pri la aliaj sencoj mi emas dubi.

***traduk/i** [...] **~ilo** KOMP Programo, kiu ~as de unu formala lingvo al alia, precipe programon skribitan en altnivela programlingvo al pli simpla lingvo, ĝenerale maŝinlingvo. ▷ *fontprogramo, interpretilo, asemblilo, bindilo.* [...]

NOTU: La bela termino *gasttradukilo* signifas tradukilon, kiu funkcias per iu speco de komputilo kaj tradukas programon por alia speco de komputilo, sed ĝi estas tro faka por PIV.

trak/o [...] **3** ELE Vojo sur magneta bendo aŭ datendisko, laŭ kiu signalo estas registrata: *du~a, kvar~a registro*; *80-~a disketo.* [...]

NOTU: La difino en PIVS estas tipe, PIVS-e ridinda: Kial "kiun oni utiligas" anstataŭ simple "uzata"? Kial "registri iujn konservindajn signalojn" anstataŭ simple "registri signalojn"?

***trakt/i** [...] **[centra ~ilo, centra ~adunuo]** [Ne enmetu.] **daten~ilo** KOMP = procesoro.

***trans.** [...] **~igo** Nombro transportata de unu ciferpozicio al la apuda pli alta dum aritmetika operacio: *pozitiva ~igo* (dum adicio); *negativa ~igo* (dum subtraho). ▷ *prunto.* [...]

NOTU: Estis granda debato pri la termino *transigo* el KBT (345). POK preferas *prunto* por negativa transigo kaj *malprunto* por pozitiva transigo. Tamen pozitiva transigo ŝajnas pli baza nocio, do estas por mi tre malkomforte derivi ĝian nomon de la alia. Kaj por mi estas malfacile imagi pozitivan transigon kiel ion analogan al pruntado. Kaj *prunti* havas sendirektan signifon (alprunti aŭ deprunti), do la nocio *malprunti* ŝajnas sensenca. Oni eble povus eviti la trian kritikon per terminoj *alprunto* kaj *deprunto*, sed restus la unua kaj dua kritikoj. La nocio estas uzata en la instruado de aritmetiko al infanoj, do eble pedagogoj povus kontribui al la diskuto.

trema/o TIP Supersigno (¨), uzata super vokalo por signi dierezon aŭ umlaŭton: *longa ~o* (˝, supersigno en la hungara).

NOTU:

Dierezo kaj umlaŭto estas lingvaj fenomenoj; tremao estas tipografia signo. Ŝanĝu la artikolojn pri *dierezo* kaj *umlaŭto* laŭnecese.

***tro.** [...] **~o 1** [...] **2** KOMP Situacio okazanta, kiam aritmetika operacio donas rezulton pli grandan ol la plej granda prezentebla valoro. ▷ *valoreksceso.* **mal~o** KOMP Situacio okazanta, kiam aritmetika operacio pri glitkomaj datenoj donas rezulton pli malgrandan ol la plej malgranda prezentebla valoro. [...]

NOTU: POK donas al ĉiu el *troo* kaj *maltroo* duan komputikan sencon rilate stakojn, sed tio estus tro faka por PIV.

Troj/o [...] **~a ĉevalo** KOMP Komputila programo, kiu ŝajnigas sin utila k sendanĝera, sed fakte estas farita por rompi la sekurecon aŭ difekti ion en komputila sistemo. ▷ *viruso.*

***tru/o** [...] **~ilo** [...] **3** TEL KOMP Aparato, regata aŭ per klavaro aŭ de elektronika signalo, por ~i ~bendon aŭ ~kartojn: *bendo~ilo*; *karto~ilo.* [...]

TTT KOMP Mll de Tut-Tera Teksaĵo, sistemo de hiperteksto en Interreto: *~-paĝo, ~-adreso, ~-legilo, ~-ejo*; *~-paĝoj estas skribitaj en HTML* (hiperteksta markolingvo). ▷ *servilo.*

NOTU: Aŭdinte la esprimon *TTT* tiom da fojoj dum la UK en Prago, mi konkludis, ke la esprimo efektive establiĝis en Esperantujo, kaj TTT mem verŝajne ekzistos dum ankoraŭ kelkaj jaroj, do mi inkluzivas ĝin.

NOTU: Rilate kapvortojn, kiuj estas mallongigoj, vidu ĉe *KD*. La esprimo *TTT* [to' to' to'] estas multe pli ofta ol la esprimo *Tut-Tera Teksaĵo*, kaj verŝajne ekzistas eĉ homoj, kiuj scias, kio estas TTT, sen scii, de kio estas la mallongigo.

***tuj** [...] **~a.** ~ okazonta, ~ fariĝonta, senprokrasta: *mi dankis lin por la ~a plenumado de mia deziro*; *~a granda sukceso*; *~a komputado* (en kiu komputilo ~ reagas al enigaĵoj; realtempa). [...]

NOTU: Mi aldonis nur la ekzemplon pri *tuja komputado* (KBT, 154). Cetere, eble la indiko pri zamenhofeco estas mislokita; komparu kun PV. Kaj laŭ mia tekstaro la zamenhofa citaĵo estas kun "plenumo" anstataŭ "plenumado". Do mi forigis la indikon.

Turing/o. Alan Mathison Turing, angla matematikisto (1912-1954): *~a aŭtomato* (speco de ideala komputilo); *~a testo* (testo por determini, ĉu komputilo povas pensi).

NOTU: Simile kiel ĉe *Buleo*, oni bezonas la nomon pro la adjektiva formo.

Unikod/o KOMP 16-bita signaro proponita por faciligi la transsendadon de diverslingvaj tekstoj (Unicode). ▷ *Askio.*

Uniks/o KOMP Mastruma sistemo uzata ekde la 1960-aj jaroj kun diversaj specoj de komputilo.

***unu** [...] **[aritmetika-logika ~aĵo]** [Ne enmetu.] **[reg~aĵo]** [Ne enmetu.]

NOTU: Tiuj esprimoj donus al *unuaĵo* sencon, kiun ĝi ne havas, laŭ PIV, dum PIV jam donis tiun saman sencon al *organo* (senco 2).

uskl/o KOMP Mll de minusklo aŭ majusklo. **~eco.** La eco esti minusklo aŭ majusklo: *atentu pri ~eco*; *~ecoblinda, ~ecdistinga serĉo*; *~ecoŝanĝo.*

NOTU: La vorto *uskleco* estas uzata en la fasado de Ĉapelilo. Mia difino de *usklo* estas trompa, ĉar la vorto *usklo* mem ne vere ekzistas. Se eblus registri kapvorton sen difini ĝin, oni povus forigi la vortojn "Mll de minusklo aŭ majusklo". Aŭ eble oni povas elpensi alian solvon.

***util/a** [...] **~aĵo 1** Objekto ~a. ▷ *uzaĵo.* **2** KOMP = servoprogramo. [...]

***v.** [...]

NOTU: La prononco de W estas simila al V, Ŭ aŭ U, depende de la lingvo. La simbolo de vato estas majuskla W kaj ne minuskla.

NOTU: Oni informis min, ke en la CO de UEA la nomo *vavo* estas ofte uzata; mi mem parolas pri *ĝermana V.*

var[4]o. [...] **[hard~o]** [Forigu.] [...] **[soft~o]** [Forigu.] [...]

NOTU: Ili ne estas kunmetaĵoj.

variabl/o MAT KOMP Grando, kiu povas alpreni iun ajn valoron en donita aro: *funkcio kun tri ~oj*; *nedependa ~o* (argumento de funkcio); *dependa ~o* (valoro de funkcio).

NOTU: Mi simple aldonis vinjeton KOMP al la matematikista difino de *variablo.*

***vart/i** (tr) **1** [...] **2** TEK Konstante prizorgi ekipaĵon ks, tenante ĝin en bona stato, ekz. per regulaj kontroloj k riparoj: *~i aŭtomobilon.* ▷ *revizii.* **~o, ~ado 1** [...] **2** Tenado de ekipaĵo ks en bona stato: *~ado de programaro, konstruaĵo*; *~okontrakto.* [...]

NOTU: La teknika senco de *varti* estas trovebla en KBT (365), ĉe POK, kaj en iu malnova numero de Monato en la kunteksto "la kialo estis nesufiĉa konstruaĵa vartado". Certe la simila dusenceco de la germana verbo *warten* kontribuis.

NOTU: Oni aldonu ankaŭ referencon de *revizii* al *varti.*

versal/o = majuskleto.

***vertikal/a.** [...] **~o** [...] **4** TIP Tipografia signo (|) kun la formo de ~a streko. ▷ *Askio.* [...]

NOTU: La signo | apartigas la nacilingvajn tradukojn en la Universala Vortaro.

***vic/o** [...] **4** MAT Aro de elementoj indicitaj per la nenegativaj entjeroj, per ĉiuj entjeroj aŭ per nur kelkaj entjeroj. ▷ *paro, opo, progresio, reto 7, filtrilo 4.* ⇒ *aro, serio, konverĝi, diverĝi, ĉeno, listo, stako, tabelo.* **aritmetika ~o.** [...]. **geometria ~o.** [...]. **harmona ~o.** [...]. [...] **~ero** MAT Elemento de ~o, termo de ~o. [...] **task~a** KOMP Rilata al reĝimo de komputado, en kiu programoj k datenoj estas arigitaj kiel tasko, k nenia interagado kun la uzanto okazas ekde la prezento de la tasko al la komputilo ĝis la reveno de la rezultoj: *task~a komputado, sistemo.* ▷ *interaga, realtempa.*

NOTU: Ne indas doni al *vico* apartan komputikan sencon, kvankam oni volonte aplikas la komunlingvan vorton parolante pri atendovicoj, ĉenoj, listoj, stakoj, unudimensiaj tabeloj, ks, do mi simple aldonis al la matematikista difino referencojn al: ĉeno, listo, stako, tabelo.

NOTU: La vorto *vico* ofte signifas *atendovicon*, sed PIV iom kaŝas tiun fakton sub senco 1 de *vico*. Cetere, PIV mencias nur la formon *atendvico*, dum la formo *atendovico* estas pli normala. Kaj mi ofte aŭdis la verbon *vici* kun la senco *vicatendi*, do eble oni menciu tion – kompreneble nur se ĝi ne kontraŭas ies tre karan gramatikan teorion!

***vid/i** [...] **~igilo** KOMP Aparato por ~igi informojn sur ekrano. ▷ *ekrano, terminalo.* [...] **~ate-~ote** KOMP (pp tekstoprilaborilo) Funkciante tiel, ke teksto aspektas sur la ekrano, same kiel ĝi aspektos sur la papero post presado: *la programo funkcias laŭ la principo ∼ate-∼ote.*

NOTU: Ie en Monato mi legis la frazon: "ĉion, kion vi vidas sur la ekrano, vi vidos poste ankaŭ sur la papero, laŭ la konata principo vidate-vidote".

vinĉestr/o (evi) = disko 5.

virtual/a [...] **2** Ne fizike reala: *FOT ∼a bildo de lenso*; *KOMP ∼a memoro, disko*; *∼a Esperanto-Biblioteko* (en TTT).

NOTU: La uzado de fakvinjetoj por etikedi ekzemplojn estas iom malofta en PIV. Ekzemplon trovu ĉe *muelilo*. Oni povus pli eluzi tiun eblon. (Bele estus havi formalan difinon de la strukturo de la artikoloj kun mencio pri ĉiu tia eblo.)

virus/o [...] **3** KOMP Komputila programo, kiu reproduktas sin sen la volo de uzanto k eventuale difektas datenojn. ▹ *troja ĉevalo*. [...]

***vok/i** [...]

NOTU: *Voki* havas ankaŭ la sencon "uzi (proceduron) en komputila programo: proceduro vokas alian proceduron, sin mem", uzatan en miaj artikoloj pri *proceduro* kaj *rekurso*, sed tiu senco ne ŝajnas aparte dokumentinda. Tamen mi dirus tute same pri senco 2 en PIV de *voko*!

***vort/o** [...] **6** KOMP Grupo de bitoj kune traktataj de komputilo. ▹ *bajto, ĉelo*. [...]

***zorg/i** [...] **∼ilo** KOMP Komputila programo, kiu peras inter la mastruma sistemo k flankaparato ks: *munti presil∼ilon*. [...]

NOTU: Mi vidis la vorton *zorgilo* plurloke, sed POK preferas la vorton *pelilo*.